

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Monique Arnaud

Ronald Glossop

Mireille Grosjean

Huang Yinbao

Katalin Kováts

Aranka Laslo

Radojica Petrović

Germain Pirlot

Svetlana Pogorelaja

Zlatko Tišljar



ENHAVO

<i>Enkonduko</i> (Mireille GROSJEAN).....	3
Zlatko TIŠLJAR: <i>Listo de bazaj morfemoj</i>	4
HUANG Yinbao: <i>Lingvoj en dialogo inter Ĉinio kaj la mondo (parto II.)</i>	9
Katalin KOVÁTS: <i>Ekparolu! – nova projekto de edukado.net</i>	13
Ronald GLOSSOP: <i>La signifo de la nuntempa homara epoko</i>	15
Svetlana POGORELAJA: <i>Nia estimo kaj bonkoreco al maljunuloj</i>	17
<i>El la landoj kaj sekcioj</i> (FI, HR, PL, RO, RU, RS, TH, US).....	19
<i>Raportoj pri niaj kontaktoj kun ekstermovadaj partneroj</i>	28
– <i>Granda fasko, grava paŝo</i> (Mireille GROSJEAN).....	28
– <i>Raporto de ILEI-reprezentantoj ĉe UNESKO 2015</i> (Monique ARNAUD)...	29
Germain PIRLOT: <i>Ĉarto de reciproka respekto</i>	30
<i>Nia Koleg-helpa Kaso (KhK) bezonas vin!</i>	31
<i>Konferenca programo kaj konferencaj servoj</i> (Radojica PETROVIĆ) ...	32
<i>Simpozia alvoko</i> (Radojica PETROVIĆ).....	38
<i>Informoj pri ILEI, redakciaj informoj</i>	40
<i>Sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj de ILEI</i>	42

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun Unesco kaj FIPLV. Reprezentado de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.

Vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.

Sekretario: Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com> Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.

Vicsekr.: Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. E-centroj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Konferencoj, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.

Estrarano: Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Ilna Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Titolpaĝe: *Pentroarto en
Esperanto-kulturo (vd. la artikolon
de Aranka Laslo sur p. 24)*

Dorskovrile supre: *Mirejo kaj la
dokumentaro por Unesko (ŝian
artikolon vd. sur p. 27);*

malsupre: *Germain Pirlot (lian
artikolon vd. sur p. 29)*

Karaj Legantoj

Jen vi ĵus ricevis la unuan numeron en la jaro 2016. 2016 estas grava jaro por ILEI. La tuta Movado rigardos la Ligon, subtenos la Ligon, kuraĝigos la Ligon. UEA kontaktis ILEI-n por lanĉi LA JARON DE LA LERNANTO. La oficiala akto por startigi la Jaron estos en Nitra okaze de la Tago de la Lernado. Kaj la JARO DE LA LERNANTO daŭros ĝis la 102-a UK en Seulo en 2017. Tio estas giganta ŝanco por ILEI kaj giganta defio. La Ligo kreskos, evoluos, firmiĝos; ne povas okazi alimaniere.

La temo de la 49-a ILEI-Konferenco en Nyíregyháza jam rilatas al tiu agado: NOVAJ VOJOJ DE LERNADO. Jes ja, la lernado evoluas, evoluas, la bezono de la lernantoj ŝanĝiĝas. La taskoj, la rolo de la instruistoj evoluas. Ni devas esti pretaj. Ni devas evolui kun la nuntempaj teknikiloj, kiuj malfermas novajn eblojn. Nia logotipo montras la instrusituacion kun staranta instruanto kaj sidanta aŭskultanta lernanto. Tiu situacio ne plu estas la ununura. Naskiĝis ebloj studi sola sur strato aŭ en buso per telefonaparato. Studento povas legi librojn per la Reto, povas diskuti vidante sian kunparolanton per skajpo en alia mondo-parto. Do la klarigoj kaj konsiloj de progresinta sperta persono estas nun unu el la lernvariantoj. Tiaj pripensoj okupas nin en Hungario; venu por riĉigi la diskutojn, por riĉigi per kontaktoj.

Mireille GROSJEAN, Prez de ILEI


Listo de bazaj morfemoj

Historio kaj sekvoj

de Zlatko TIŠLJAR (Slovenio)

Esperantistoj dekomence daŭre reklamas E-on kiel lingvon FACILAN, multoble pli facile lerneblan ol aliaj lingvoj. Kaj ni ĉiuj, kiuj lernis ĝin, tre bone tion scias, sed iu vera senduba pruvo ĝis nun ne ekzistas. Samtempe okazas polemikoj, ĉu E-o estas vere facila aŭ ne, ĉar ja eblas rapide montri, ke tre bonaj konantoj de E-o estas tre malmultaj kaj ke scipovi E-on tiel ke oni povus legi la plej kvalitan literaturon kaj mem verki altkvalitajn fakajn tekstojn aŭ literaturaĵojn, aŭ por povi bonege traduki, necesas multaj jaroj da lernado. Kie efektive estas la vero? La vero kaŝiĝas en simpla pedagogia leĝo, ke lernado de iu ajn materialo ne okazas linie (ke investante la saman tempon oni akiras la saman kvanton da scioj), sed eksponenciale, ĉar neniu materialo estas plene finlernebla. Do komence oni lernas pli rapide kaj pli sukcese, sed ju pli profunde oni eniras studaĵon, des pli malrapidiĝas ĝia akiro kaj fine la lernotempo tendencas al senfino. La kompleta scio de io ajn ne estas atingebla. Tio validas por kiu ajn lernendaĵo, sed ĉu similaj scioj kiel akiri lingvojn havas la saman lernkurbiĝon? Ĉu do la eksponenciala kurbiĝo, por ke hindeŭopa lernanto lernu la ĉinan aŭ la anglan, estas la sama kiel por lerni E-on? Klaras ke ne. Kiel do klarigi la fenomenon de lernfacileco aŭ lernmalfacileco. Per la jena kurbiĝo:

LINGVOKONO



eo.ligilaro.wikia.com

Efektive aliaj lingvoj ne havas identan kurbiĝon kiel montras la grafikaĵo. Ĉiu estas iom diferenca, sed la ĉi-supra lila linio simbolas aliajn lingvojn, ĉar kompare kun E-o, ili ĉiuj havas kurbiĝon similan al la montrita lila.

Tio estas proksimuma prezento de la stato. Laŭ ĝi videblas unu esenca fakto: En tempo 1:10 Esperanton eblas lerni dekoble pli ol aliajn lingvojn. Ju pli longa la lernotempo, E-scio daŭre estas pli alta ol tiu de aliaj lingvoj, sed la diferenco ĉiam estas malpli granda. En la nivelo flua, oni scias ne dekoble sed nur kvaroble pli da Esperanto, en nivelo literatura, la tempo sama donas nur duoblan avantaĝon al E-o, dum la nivelo PERFEKTA egalas: kaj E-on kaj aliajn lingvojn komplete kaj perfekte ne eblas lerni, ambaŭ estas same senfine malfacilaj.

En tio kuŝas la respondo al la supre menciitaj polemikoj. Kaj kiajn utilojn ni havas de tiu scio? Povi klarigi la facilecon? Esence jes, sed ne tre evident-maniere.

La baza avantaĝo de tiu scio estas, ke ĝi ebligas decidi, laŭ kiuj ŝtupoj oni lernu E-on, por ke ĝia facilec-avantaĝo estu sendube klara al la lernanto kaj sekve motivdona. Al ĉiu ĝi tuj diras, ke dekoble pli facila ĝi estas NUR en tre komenca scioŝtupo. Se oni instruas ĝin, la lernantoj vere ege rapide progresos kaj povos uzi tiun komencan scion post kelkaj lernotagoj, aŭ en la plej malkonvenaj kondiĉoj post kelkaj semajnoj. Tiu fakto devas konvinki ĉiun suspektanton kaj entuziasmigi lin/sin por plua lernado.

Sed pasis 130 jaroj de post la ekezkisto de E-o kaj la e-istaj pedagogoj ne komprenis tion kaj neniam klopodis adapti siajn lernolibrojn kaj metodojn al tio. Kvankam jam post dudeko da jaroj iuj skribis pri tio kaj la unua, kiu klare esprimis tion estis Kálmán KALOCSAY en „*Lingvo – stilo – formo*” 1931:

„Devas ekzisti limita vortprovizo, la trunko de la lingvo. Ĉiu, kiu volas uzi la lingvon nur por ĉiutagaj bezonoj, devas koni ĉi tiun lingvo-trunkon, sed ne bezonas nepre koni pli multe. Ĉiu, kiu volas esti certa pri tio, ke oni lin komprenos, devas uzi nur ĉi tiun trunkan vortprovizon, alie li riskas miskomprenon. Sekve, ĉiuj lernolibroj devas enhavi ĉi tiun vortprovizon, sed nenion pli.”

Sed malgraŭ tio neniu esence okupiĝis pri tiu problemo kun la celo difini, kio estas la lernelementoj por tiu ĉi unua nivelo: kiujn vortojn kaj gramatikaĵojn oni lernu por akiri nur tiun scion, kiu ebligas lingvouzon, sed per minimuma tempoinvesto?

La unuaj, kiuj serioze komprenis tiun ĉi problemon, estis instruista grupo en Zagrebo fine de la sepdekaj jaroj de la 20-a jarcento. Ili rimarkis, ke instruante al plurcento da infanoj en elementaj lernejoj, ili atingis mizerajn rezultojn post du- aŭ trijara instruado, praktike tre similajn al tiuj, kiujn

atingis instruistoj de iu ajn fremdlingvo. Ili eksuspektis, ke la kaŭzo kuŝas en malĝusta lernmaterialo troviĝanta en de ili uzataj lerniloj. Kaj fiksiĝis la decido esplori, kiu estas tiu necesa lernenda materialo? Mi mem tiam studis humanisman informadikon en Zagrebo kaj proponis al mia profesoro fari diplomlaboraĵon pri frekvenc-morfemaro de parolata E-o kaj li akceptis. Necesis trovi la plej ofte uzatajn materialojn en praktika parola uzo de e-istoj, sed ne temas pri vortofteco – nombradoj de vortoftecoj ekzistis ja ankaŭ antaŭe kaj ne helpis kompreni la problemon. Necesis nombri morfemojn (vort-elementojn unuope, ekz: mal-san-ul-ej-o-j-n). En 1979 mi surbendigis dum la Lucerna UK simplajn interparolojn de kongresanoj sur eta magneto-fono (60 000-vortan materialon), sed poste transskribis de sur la bendoj paperen ĉirkaŭ 25 000 vortojn. Fine en 1980 kaj 1981 mi transtajpis tiun materialon en la universitatan komputilon, tiel ke mi surdiskigis ĉiujn vortojn laŭ la supra ekzemplo per streketoj, kio estis signo por komputilo, kie estas limo de morfemo kaj kion ĝi nombru. En 1982 mi prezentis mian diplomlaboraĵon kaj ĝiajn konkludojn. La baza konstato estis, ke tiu tuta materialo konsistas el ĉirkaŭ 1500 diversaj morfemoj, el kiuj la unuaj 467 laŭ ofteco kovras 95% de la tuta parolaĵo kaj ĉiuj aliaj 1000 diversaj malpli oftaj morfemoj kovris nur 5% de la paroloj. Kaj la rezulto estis listo de morfemoj laŭ ofteco. Sekve la diplomlaboraĵo donis tion, kion ni serĉis: kiuj bazaj vortelementoj estas nepre lernendaj komence, por ke ĉiu povu uzi Esperanton parole post minimuma investo de tempo.

La instruista grupo en Zagrebo, kiun mi gvidis (plus Spomenka ŠTIMEC, Roger IMBERT kaj Ivica ŠPOLJAREC kun posta helpo ankaŭ de Tibor SEKELJ) ellaboris 12-lecionan lernolibron, en kiu estis distribuitaj tiuj 467 morfemoj, kaj la novan metodon oni poste nomis la „Zagreba Metodo”, uzata nun jam pli ol tridek jarojn kaj adoptita al kvardeko da mondaj lingvoj. Tamen, ĝeneralan aprobon la metodo ne atingis inter la esperantistaro, ĉar la pedagogoj simple ne volis agnoski, ke tio estas esenca por la komencantoj kaj ĉiu plu faris lernolibrojn laŭ la propraj gusto kaj intuicio.

Similan esploron neniam iu ajn poste entreprenis. Vortojn oni nombris multfoje kaj aperis diversaj esploroj – la plej lasta estas tiu de d-rino Sabine FIEDLER en 2014, kiu prezentas vortoftecon de Esperanto el skribitaj tekstoj surbaze de plurmiliono korpuso (http://univerlag-leipzig.de/catalog/article/1593-Frequency_Dictionary_Esperanto).

Sed fine en 2015 sinjoro Raymond GÉRARD el Belgio (Remuŝ) evoluigis softvaron, kiu bonege, kun tre minimuma erarkvanto, ebligis aŭtomate nombri morfemojn komputile en Esperantaj tekstoj. Tio ebligis realigi

esplorojn kompareblajn kun tiu mia el 1982. Kaj post pluraj komparoj ene de diversaj tekstoj unue nia duopo akiris bazan morfemliston, kiu ekestis el kombino de mia listo kaj frekvenclistoj de porinfanaj similgrandaj libroj kiel ekz. la fama libro de SAINT-EXUPÉRY „*La Eta Princo*”, do tekstoj skribitaj. Tiun bazan morfemliston ni publikigis en la jaro 2015 en la aŭgusta numero de *Eŭropa Bulteno* (<http://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=439&filename=eb-151-2015-08.pdf>) kaj ĝi konsistas el 445 morfemoj. Tamen por atingi finan bazan liston, ni decidis esplori enorman skribitan tekstaron kaj kompari ĝiajn rezultojn kun ĉi tiu baza listo. Sinjoro Remuŝ elektis 49 prozajn librojn kun 2 017 652 vortoj kaj komputile analizis la morfemojn en tiu tekstaro. Tiu materialo konsistis el 16 653 diversaj morfemoj (bazaj vorteroj), sed tre simile kiel en niaj antaŭaj kaj mia esploro, 95% de la tuta korpuso estis kovritaj de la nur 412 plej oftaj morfemoj kaj ĉiuj aliaj pli ol 16 000 malpi ofte uzataj morfemoj kovris nur 5% de la korpuso.

Troviĝis iom da diferenco, ĉar inter tiuj proksimume 450 plej oftaj morfemoj de la grandega skribita tekstaro troviĝis 94 eroj, kiuj ne troviĝas en la baza listo. Sed el inter ili 68 jam enestas en la Zagrebmetoda lernolibro. Sekve ni nun povas aŭtoritate kaj baze de vere detalaj esploroj fari la jenan konkludon:

Se konsideri ĉefe la bezonon de parola uzo ekzistas baza morfemlisto kovranta 95% de la tekstaro necesa, kiun ni plu konsideras TRE ELEMENTA Baza Listo por krei kiun ajn lernolibron por komencantoj kaj kiu estu rekomendaĵo por ĉiuj kreantoj de novaj lerniloj. Jen ĝi:

*a aĉ aĉet ad afer ag ajn aĵ akcept aktiv akv al ali almenaŭ alt am amas amik
an ankaŭ ankoraŭ anstataŭ ant antaŭ apart aper ar aranĝ art as aspekt at
atend atent ating aŭ aŭd aŭskult baldaŭ bedaŭr bel bezon bon cel cent centr
cert ĉambr ĉar ĉe ĉef ĉi ĉiam ĉirkaŭ ĉiu ĉu da dank daŭr de decid dek dekstr
demand dev dezir dimanĉ dir dis divers do dom don dorm du dum e ebl ec eĉ
edz eg ej ek ekskurs ekster ekzempl ekzist el elekt em en er esper est estr et
eŭrop facil fakt fal famili far fart feliĉ ferm fin flank foj for forges form fort
frat fru funkci gajn ge german grand grav grup gvid ĝeneral ĝi ĝis ĝoj ĝust
halt hav hejm help hieraŭ histori hodiaŭ hom hor i ia iam ide ie ig iĝ il ili
imag in ind infan inform instru int inter interes io iom ir is ist it ital iu j ja
jam jar je jen jes jun juĝ ĵaŭd kaj kant kap kapabl kapt kar kaŝ ke kelk kia
kial kiam kie kiel kies kio kiom kiu klar komenc kompren komput kon koncern
konsent konsist kontraŭ korp kost kovr kred kresk krom kuir kultur kun kur
kutim kvankam kvar kvazaŭ kvin la labor land las last laŭ leg lern leter li
liber libr lig lingv lok long loĝ lud lum lund mal man manĝ manier mank mar
mard maten mem memor merkred met mez mi mil milion minut mir mon*

monat mond montr morgaŭ mort mov mult n naci nask naŭ ne neces nek ni nokt nom nov nu numer nun nur o oft ok okaz okcident okul okup ol on oni ont opini ordinar organiz os pag pardon parol part pas patr paŝ pens per perd person pet pied plaĉ plan plej plen pli plor plu plur por port post postul pov poŝ pren preskaŭ pret prezent prezid pri pro problem produkt profesi proksim propon propr prov publik pur radi rajt rakont rapid raport re reg regul renkont respond rest ret ricev riĉ rid rigard rilat rimark romp sabat saĝ salut sam san sat sci scienc se sed sekv semajn sen send sent sep serĉ ses si sid signif silent simil simpl sinjor sistem skrib sol spert star strat sub sufiĉ sukces super supr sur ŝajn ŝanĝ ŝat ŝi ŝir tabl tag tamen tekst tem temp ten tia tial tiam tie tiel tim tio tiom tiu tra trans tre tri trink tro trov tuj tut u uj ul um universitat unu urb us uson util uz valor varm vast ven vend vendred ver verk vesper veter vetur vi vid vir viv vizit voĉ voj vojaĝ vol vort zorg.

Tiuj, kiuj volas, ke ilia lernolibro enhavu ankaŭ morfemojn ofte uzatajn en skribaj tekstoj, aldonu al ĝi la jenan liston:

arb, kri, seĝ, ter, kor, lev, knab, kuŝ, ŝip, pord, vizaĝ, di, fil, turn, moment, vest, apud, ĵet, terur, tir, bril, flug, id, serv, trankvil, strang, flor, kamp, sun, mont, ruĝ, subit, salt, lit, profund, son, konduk, kuraĝ, gaj, fajr, ordon, or, anim, nigr, efektiv, preĝ, best, blank, permes, ĉeval, brak, hund, bat, gard, vent, prem, bru, laŭt, bird, ambaŭ, frap, vok, ŝton, milit, kompat, brul, ĉiel, bord, kaŭz, fenestr, pend, batal, buŝ, etend, kontent, trem, pec, hel, aĝ, ceter, river, kolor, lign, sek, koler, popol, fiŝ, sankt, intenc.

Ĉi tiuj pliaj 89 morfemoj do estu aldonitaj aŭ uzataj en pli supera kurso post la baza. Sed la plej simpla tuja solvo estas por la baza kurso uzi la jam ekzistantan lernolibron de la „Zagreba Metodo”, en kiu enestas ĉiuj morfemoj de la Baza Listo kaj 68 el la aldonajoj, do preskaŭ ĉio el ambaŭ listoj.

Kreantoj de daŭrigaj kursoj (A2 kaj B1) principe povas decidi uzi kiujn ajn morfemojn, ĉar en tiuj niveloj ne plu tiom gravas miksi la nivelojn, sed ĉiu el ili povas uzi la frekvencaron de Remuŝ faritan el 2 milionoj da vortoj kun sinsekva ofteclisto de 16 653 morfemoj kaj daŭrigi laŭ la ofteco en tiu listo (ekzemple preni la postajn 500 morfemojn laŭ ofteco. Ĝin vi trovas ĉe: <http://remush.be/teksto/> klakante sube al *oftecoj.ods* kaj rigardante la kolumnon E).

Lingvoj en dialogo inter Ĉinio kaj la mondo¹

(parto II.)

de HUANG Yinbao „Trezoro” (Ĉinio)

6. La ĉina lingvo

Ĉinio havas 1,3 miliardojn da loĝantoj. Laŭ la nombro de la loĝantaro, Ĉinio estas la plej granda lando en la mondo. Post la reformado kaj pord-malfermo, Ĉinio fariĝis ekonomie pli kaj pli potenca. Dum la angla lingvo evoluas en Ĉinio, de tempo al tempo aperas diversaj artikoloj pri la graveco de la ĉina lingvo. Oni unuflanke plendas kontraŭ instruado de la angla lingvo, aliflanke konscias, ke la ĉina lingvo kiel unu el la oficialaj lingvoj de UN, kaj kies denaskaj parolantoj konsistigas pli ol kvinonon de la loĝantaro de la terglobo, rajtas aŭ devas roli kiel grava dialoga lingvo inter Ĉinio kaj la mondo.



La sveda sociologo s-ro George WEBER listigis la lingvojn en la mondo laŭ la parolantoj jene:

- | | |
|----------------------------|-----------------------------------|
| 1) ĉina lingvo (20,7%) | 2) angla lingvo (6,2%) |
| 3) hispana lingvo (5,6%) | 4) hinda kaj urdua lingvoj (4,7%) |
| 5) araba lingvo (3,8%) | 6) bengala lingvo (3,5%) |
| 7) portugala lingvo (3,0%) | 8) rusa lingvo (3,0%) |
| 9) japana lingvo (2,3%) | 10) germana lingvo (1,8%) |

Laŭ la listo oni ŝatus levi elpensitan ekzemplon „internacia vilaĝo”, ekz.: se sur la terglobo ekzistus internacia vilaĝo kun 10 loĝantoj, el ili nur 2 homoj en la vilaĝo parolus la saman lingvon, nome la ĉinan lingvon, kaj la aliaj 8 homoj tute ne povus interkomunikiĝi per la propraj lingvoj. Neniu en la vilaĝo havus samlingvanojn krom la du ĉinaj parolantoj. Kiu lingvo ja devus esti elektita kiel komuna lingvo de la vilaĝo laŭ ĝenerala pensmaniero? Kompreneble la ĉina lingvo! Ĝuste pro tio nemalmultaj ĉinoj kaj neĉinoj alvokas disvastigi la ĉinan lingvon tra la mondo.

¹ Prelego el la Simpozio „Lingva justeco kaj paco – kiuj defioj por la nuna mondo”, Oostende, 23-24 julio 2015

En 2003 Ĉinio lanĉis la projekton „Ĉinlingva Ponto” por disvastigi la ĉinan lingvon tra la mondo. La 26-an de marto 2004 Ĉinio publikigis la projekton „Plano de Internaciaj Ĉinlingvaj Instruistaj Volontuloj” kaj la „Testan Metodon de Ĉinlingva Instrua Kapablo”; en la 1-a de oktobro ĝi lanĉis tutmondan projekton pri „Konfuceaj Institucioj” kaj unuafoje starigis tri Konfuceajn Instituciojn aparte en Koreio, Pakistano kaj Rusio. Ĝis 2014 Ĉinio starigis 475 Konfuceajn Instituciojn, 851 Elementajn Mezlernejajn Konfuceajn Kursojn en 126 landoj, kun 3 400 000 registritaj lernantoj de la ĉina. En la 17-a de decembro 2008 Ĉinio starigis Televidan Konfucean Institucion por instrui la ĉinan lingvon al la tuta mondo. La laborantoj, volontulaj instruistoj kaj administrantoj de Konfuceaj Institucioj, superis 100 000. Ĉinio trejnigis 200 000 eksterlandajn instruistojn de la ĉina, akceptis 25 000 studentojn de la ĉina el eksterlandoj, eldonis 1 300 diversajn ĉinlingvajn lernolibrojn pri la ĉina en 54 lingvoj, sukcese organizis Mondan Ĉinlingvan Konferencon, Ĉinlingvan Konferencon por Fremdlandanoj ktp.

Samtempe Ĉinio lanĉis Sistemon pri Ĉinlingva Ekzameno (HSK), kreis 860 ekzamenajn lokojn en 112 fremdaj landoj, el kiuj 530 troviĝas ekster Ĉinio. Ĝis 2014, 61 landoj jam enkondukis la ĉinan lingvon en la landajn edukajn sistemojn. La lernantoj pri la ĉina lingvo atingis ĉirkaŭ 100 000 000, altiĝis 3,3-oble kompare kun antaŭ 10 jaroj.

En 2001 la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de Ĉinio oficiale deklaris rezigni pri la uzo de la angla lingvo kaj uzi nur la ĉinan lingvon en gazetaraj konferencoj. Ekde tiam la oficialaj parolistoj de la registaro okaze de la gazetaraj konferencoj rifuzis respondi demandojn de neĉinlingvaj ĵurnalistoj. Eksterlandaj ĵurnalistoj, kiuj ne scipovis la ĉinan lingvon, ne plu havis ŝancon labori en Ĉinio. Ili devige komencis lerni la ĉinan lingvon.

En la mondo aperas voĉo, ke la ĉina lingvo estas la venonta monda lingvo. Mi ne kredas, ke la ĉina lingvo fariĝus monda lingvo, tamen mi kredas, ke la ĉina lingvo en venonta tempo fariĝos grava dialoga lingvo inter Ĉinio kaj la mondo, ke pli kaj pli da ĉinoj preferus uzi la ĉinan lingvon kiel dialogan lingvon.

En 2014, s-ro Philip VANHAELEMEERSCH en Belgio, publikigante artikolon en la anglalingva Popola Reto en Ĉinio, forte subtenis la disvastigon de la ĉina lingvo en Eŭropo. Lia artikolo diris, ke la ĉina lingvo havas potencialon por unuigi diversajn grupojn trans naciaj kaj lingvaj limoj en Eŭropo. Malgrandaj lingvo-grupoj en Eŭropo opinias, ke la ĉina estas tia monda lingvo, kia ne anstataŭigas la ekzistantan lingvan diversecon en la regiono

kaj rolas kiel aliancano kontraŭ tia lingvo kia la angla, kiu pli kaj pli trudas sin kiel la solan komunikilon en Eŭropo. Krome la ĉina en Eŭropo havas la avantaĝon de eksterulo. La lingvo ne ligiĝas al iu eŭropa lando, kie loĝas ĝiaj denaskaj parolantoj, kaj en tiu senco ĝi estas neŭtrala.

7. Esperanto

Ĉinio ne povas akcepti iun ajn fortan fremdan lingvon kiel ununuran komunikilon en la dialogo inter Ĉinio kaj la mondo, kaj la ĉina lingvo same kiel ĉiu ajn fremda lingvo ne povas sola roli en la dialogo inter Ĉinio kaj la mondo. Dum kreskas la nombro de la lernantoj pri la ĉina tra la mondo oni rimarkis, ke la nombro de lingvoj uzataj de Ĉinio rapide kreskas. La lingvoj en elsendoj de Ĉina Radio Internacia kreskis rapide ĝis 65, inkluzive de E-o.

Dum la ILEI-Konferenco en Herzberg, Germanio, 2013, post mia prelego kun la titolo „Angla lingvo perfortas ĉinajn junulojn”, iu esperantistino diris al mi, ke E-o venkus, se Ĉinio akceptus ĝin kiel oficialan nacian lingvon. Laŭ mi E-o ne povas fariĝi oficiala lingvo de iu ajn nacio, almenaŭ en proksima estonteco. Tamen E-o kiel la plej facila kaj neŭtrala lingvo havas ŝancon en la dialogo inter Ĉinio kaj la mondo, se oni pensas pri lingvaj facileco, ekonomio, ekologio, homaj rajtoj, kaj la nuna situacio de E-o en Ĉinio. Ĉi tie mi volas prezenti al vi la nunan situacion de E-o en Ĉinio.

En Ĉinio ekzistas tutlanda E-organizo, Ĉina E-Ligo, kun mil individuaj membroj kaj ĉirkaŭ 30 lokaj (provincaj aŭ urbaj) asocioj aŭ grupoj. Kelkaj gravaj internaciaj E-organizoj havas piedojn en Ĉinio, ekzemple ILEI, IKEF, IFEF. Ĉinio havas la plej grandan kaj luksan E-Muzeon en la mondo. Laŭ raporto de Verda Retejo en Ĉinio, la lernintoj de E-o en Ĉinio iam atingis ĉirkaŭ 500 000. Tamen neniuj scias, kiom da esperantistoj troviĝas en Ĉinio. En 2015 UEA havas 1100 aligitajn membrojn kaj 155 individuajn membrojn en Ĉinio. Ĉirkaŭ 150 ĉinaj esperantistoj aliĝas al internaciaj fakaj E-asocioj, 87 ĉinoj aliĝis al la 100-a UK, kaj 22 ĉinoj aliĝis al la ILEI-Konferenco. En Ĉinio troviĝas 11 E-retejoj, 10 kursoj en kolegioj kaj altlernejoj, 8 kursoj en elementaj aŭ mezaj lernejoj, 5 kursoj ekster lernejo, 4 retaj kursoj. Ĉinio eldonis sume 630 E-librojn. La plej famaj kvar romanoj en la ĉina historio kaj la verko de s-ro MOYAN, Nobel-premiito pri literaturo, estas eldonitaj en E-o, 4 bultenoj, 2 E-aj radiaj stacioj (Ĉina Radio Internacia kaj Esperanta Elsendo de BRE), E-Centro Ora Ponto, E-Domo, 7 varoj kun E-etiketoj.

Ĉirkaŭ 30-40 e-istoj profesie laboras: en Ĉina Radio Internacia (pli ol 10), ĉe El Popola Ĉinio (pli ol 10), en la E-muzeo (4), en profesiaj kolegioj (2),

elementaj lernejoj (6) kaj aliaj E-organizoj (3). Ili regule ricevas salajron per E-o. El ili 3 homoj estas dungitaj fremdlandaj e-istoj. La financoj venas de la ĉina registaro. ĈRI kaj EPĈ (ĈEL) havas 20-30 ŝtatajn oficistojn, kies salajrojn liveras la registaro. Kaj EPĈ (ĈEL) dungis 1-2 fremdlandajn e-istojn kiel laborantojn.


Ĉinio havas du ŝtatnivelajn E-organizojn, nome ĈRI kaj EPĈ (ĈEL). La organizoj estas subfilioj de ŝtataj departementoj. Tra la E-organizoj la registaro uzas E-on kiel komunikilon inter Ĉinio kaj la mondo. Ĉina Radio Internacia (ĈRI) estas internacia publika elsenda organizo en Ĉinio. E-o estas unu el la 65 elsendaj lingvoj de la radio. Ĉiutage la radio elsendas programojn en E-o dum ĉirkaŭ unu horo. El Popola Ĉinio estas filio de Ĉina Fremdlingva Departemento. La departemento havas diverslingvajn oficejojn. E-o estas unu el la fremdaj lingvoj uzataj por propagandi Ĉinion. Ĉina E-Ligo estas filio de El Popola Ĉinio (<http://www.espero.com.cn>). La E-redakcio de EPĈ konstante dungas 1-2 fremdlandajn e-istojn kiel laborantojn. La gravaj taskoj de la du ŝtatnivelaj E-organizoj estas propagandi ĉinajn aferojn, informi la mondon per E-o. La plej freŝaj novaĵoj pri Ĉinio ofte paralele aperas en ĈRI, EPĈ kaj aliaj gravaj komunikiloj. Kvankam la lingvo E-o en Ĉinio ankoraŭ estas malforta kompare kun aliaj fortaj naciaj lingvoj, tamen la utileco estas tre evidenta, ĉar esperantistoj troviĝas en 130 landoj. La aŭskultantoj de E-elsendo de Ĉina Radio Internacia, kaj la retumantoj de El Popola Ĉinio (www.espero.com.cn) kaj Reta Ĉinio (esperanto.china.org.cn) troviĝas en pli ol cent landoj. Multaj eksterlandanoj per E-o ricevas diversajn informojn pri Ĉinio. La lingvo ja rolas kiel dialoga lingvo inter Ĉinio kaj la mondo.

Mi iam demandis al gravuloj de ĈRI kaj EPĈ: kiel la registaro juĝas ilian laboradon? Ili respondis, ke la registaro juĝas la laboron laŭ la aŭskulta frekvenco kaj klavadaj fojoj en la retejoj. Tio signifas, ke ju pli multfoje oni aŭskultas la radion aŭ vizitas la retejojn, des pli bone la registaro juĝas la valoron de E-o. Multaj aŭskultantoj de Ĉina Radio Internacia iam invite vizitis Ĉinion. La registaro pagis iliajn kostojn. Tio fakte estas investo de la ĉina registaro laŭ la valoro de E-o. La registaro investinte en E-o, per la internacia lingvo realigis la celon – dialogi kun la mondo. Ĉinio unuflanke esperas, ke la mondo pli vaste akceptos la ĉinan lingvon, aliflanke ĝi profunde konscias, ke la ĉina lingvo estas preskaŭ neebila, por ke la mondo akceptu ĝin kiel mondan lingvon pro la malfacileco. Kaj E-o kiel neŭtrala ponta lingvo estas pli facile akceptebla por la pli kaj pli potenca Ĉinio ol aliaj fortaj naciaj lingvoj.

(fino)

Ekparolu! – nova projekto de edukado.net

de Katalin KOVÁTS (Nederlando/Hungario, redaktanto@edukado.net)



Ni informas vin, ke en la jaro 2016 edukado.net komencos grandan, novan projekton, kiun ni nomis EKPAROLU!

Celo de la projekto:

- Doni eblon al la ĵuslernintoj de Esperanto parole apliki la lingvon, ensociiĝi, kaj informi ilin pri la programoj, kursoj kaj pluaj ebloj de studoj
- Vaste eluzi la liberajn fortojn de la movadanoj partopreni en la plua edukado de komencintoj
- Fortigi la lokajn klubojn kaj la movadon

Baza ideo

Ene de *edukado.net* ni kreos surfacon, kie la du flankoj, nome GENEVOJ – (komencintoj) kaj GEONKLOJ (speciale trejnitaj esperantistoj) trovas unu la aliajn kaj helpe de skajpa kontaktiĝo pasigas kune parolsesiojn. Ni nombros la sesiojn ambaŭflanke.

GENEVOJ devus anonci sian intencon uzi la servon. Ni akceptos tiujn, kiuj estas je A2-nivelo, aŭ finis la arbon de DUOLINGO, konas la bazon de la gramatiko kaj konas minimume 300 vortojn. Enirinte la programon ili ricevos rajton je 20 (aŭ 30) sesioj de 20 minutoj (decidota) por ekzerci sin en la parolata lingvo.

Ili povos elekti, kion ili volas ekzerci: prononcadon, paroladon laŭ difinitaj temoj aŭ liberan konversacion, ekzerci sin pri konkretaj gramatikaĵoj aŭ korektigi kelkfoje skribaĵojn.

GEONKLOJ estos spertaj esperantistoj, sed ne nepre instruistoj. Ilia tasko estos la paroligo de komencintoj. La geonkloj havu minimume B2-nivelon (prefere kun KER-atestilo). Ili ricevos formadon pri uzo de retprogramoj, ekzemple skajpo.

Edukado.net disponigas mallongan manlibron pri la strukturo kaj ĉefaj reguloj de sukcesa paroliga sesio, kaj por ĉiu temo, kiun la nevoj povos elekti, ni donos unupaĝan resumon, helpe al la onklo.

La geonkloj faros sian agadon senpage, sed la plej aktivaj ricevos premiojn. La programo ebligas al ordinaraj esperantistoj, ankaŭ por nevojaĝemaj aŭ malhelpataj finance aŭ fizike en movoj, ke ili partoprenu en la movado, sentu sin utilaj. Ni havas multajn neuzitajn fortojn, kiujn ni povas tiel aktivigi.

Kio farendas nun?

- La multe pli detala priskribo de la projekto jam ekzistas.
- La estraro de la Fondaĵo edukado.net aprobis ĝin, subtenas, kaj komenciĝis traktado kun la programistoj.
- Ni serĉas bonan logotipon kaj trafajn grafikaĵojn por la diversaj partoj de la koncerna programo. (Alvoko disiros baldaŭ).
- Necesas trovi ankaŭ financajn subtenantojn.
- Sed la plej grava afero estas nun, ke paralele kun la programista laboro **ni jam enketu pri tio, kiuj pretos esti la unuaj onkloj kaj onklinoj**, kiuj pretos kunpensadi, perfektigi kaj poste testi la programon, kaj eventuale helpi en la plua formado de aliaj onkloj.

Interesiĝantoj kontaktu edukado.net, kiu kreos por la geonkloj apartan forumon kaj gvidas ilin en la unuaj paŝoj.

Prezento farita la 23-an de novembro 2015 en Vroclavo, Pollando, dum simpozio. Okazis posta interpretado al la pola lingvo.

La signifo de la nuntempa homara epoko

de Ronald GLOSSOP, profesoro emerita kaj Prezidanto de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE)



Ni vivas dum tre grava periodo en la historio de la homaro. Ni homoj nun spertas gravan transiron de mondo, kie ekzistas multaj diversaj landoj kun siaj propraj registaroj kaj lingvoj, al tute novspeca tutmonda komunumo.

La tri jarcentoj ekde la jaro 1600 ĝis la jaro 1900 estis la periodo de naciismo. Nia mem-identigo estis tute laŭ la lando, kie ni loĝas. Nia lojaleco estis al la registaro de la Nacia Ŝtato, en kiu ni loĝas. Plejparte ni ne bezonis scipovi lingvon krom nian nacian lingvon, ĉar ne multaj homoj vojaĝis al aliaj landoj. Efektive multaj homoj ne povis eĉ legi aŭ skribi.

Poste iom post iom la homaro travivis la transiron de la mallarĝa naciismo iomete al inter-naciismo. Dum la dudeka jarcento, la jarcento de inter-naciismo, homoj pli konsciis pri la ekzisto de aliaj landoj en la mondo. Pro la invento de novaj iloj ni povis komuniki je pli grandaj distancoj kaj veturi pli facile kaj rapide de unu loko al alia. Post du grandaj militoj ni konsciis, ke ni ne plu povas ignori tion, kio okazas en aliaj landoj. Tamen nia mem-identigo restis ĉefe al nia propra lando. Ni homoj ankoraŭ pensis tiel: mi estas

franco aŭ mi estas brito aŭ mi estas polo aŭ mi estas ruso aŭ mi estas usonano, kaj tiel plu. Sed dum la dudeka jarcento la gvidantoj de la landaj registaroj ekkreis internaciajn instituciojn kiel la *Ligo de Nacioj* kaj la institucion *Unuiĝintaj Nacioj* por malebligi militojn kaj komenci kunlabori inter-nacie. Por komuniki kun homoj, kiuj uzis malsamajn lingvojn, ni dependis de tradukistoj kaj interpretistoj. Nia

bildo de la mondo estis mapo aŭ globo, kie la diversaj landoj aperis en diversaj koloroj kun dika nigra linio ĉirkaŭ ĉiu lando, sed ni samtempe ekkonstatas, ke estas multaj diversaj landoj en unu granda mondo. Nun dum la dudek-unua jarcento okazas alia eĉ pli grava transiro de la inter-naciismo al la tutmondismo. Nun ni konscias la foton de la Tero el la spaco. [Sur la grafikaĵo: Tero. Tio, kion oni pensas pri mi. Tio, kio mi vere estas.]

Ni komencas pensi pri ni mem ĉefe kiel homoj, kiuj loĝas kune sur la planedo Tero kaj nur duavice kiel civitanoj de nur unu lando. Homoj ofte veturas al aliaj landoj kaj eĉ geedziĝas kun homoj el aliaj landoj. Pro la interreto ni povas rapide komuniki kun aliuloj en aliaj landoj kaj eĉ en aliaj kontinentoj.



Ni komencas konstati, ke la konfederacia organizo *Unuiĝintaj Nacioj* ne plu sufiĉas por trakti la urĝajn tutmondajn problemojn de nia planedo. Ni nun bezonas tutmondan federacian registaron por trakti la problemojn de la tutmonda komunumo, dum la landaj registaroj prizorgas tiujn problemojn, kiuj okazas interne de ilia lando kaj regionaj registaroj kiel la Eŭropa Unio prizorgas regionajn problemojn.

Plue ni iom post iom pli konscias, ke krom la naciaj lingvoj ni bezonas komunan tutmondan lingvon por la tutmonda komunumo. Momente ŝajnas, ke eble la angla lingvo iĝis tiu tutmonda lingvo, sed tio ne estas bona solvo de la problemo de komuna lingvo por la tutmonda komunumo. **La tutmonda uzo de iu ajn nacia lingvo ne estas justa solvo.** Plue, tio ne estas la plej bona solvo. La tutmonda komunumo bezonas neŭtralan tutmondan lingvon, kiun ĉiuj povas lerni pli facile kaj pli rapide, nome Esperanton.

Malsame ol la angla aŭ la hispana aŭ la ĉina aŭ la rusa aŭ aliaj naciaj lingvoj, E-o tute ne minacas iujn ajn ekzistantajn lingvojn. Ĉe E-o ne ekzistas potencaj landaj registaroj, kiuj volas postuli, ke la aliuloj uzu ilian nacian lingvon. Se la tutmonda komunumo uzus la desegnititan nenacian lingvon E-o, homoj povus ankoraŭ uzi la diversajn naciajn lingvojn interne de tiuj lokoj, kie oni nun uzas ilin, dum E-o estus uzata por la internacia komunikado. Oni konservus la diversecon de lingvoj kaj kulturoj, eĉ dum la homaro povus uzi E-on kiel la komunan lingvon por la tutmonda komunumo.

Nia estimo kaj bonkoreco al maljunuloj

de Svetlana POGORELAJA, sekciestro de ILEI-UA, universitato3a@ukr.net



Mi ĉiam penis helpadi al maljunuloj, des pli al tiuj, kiuj ja suferadis en la malfacilegaj jaroj por mia tuta lando Ukrainio dum la dua mondmilito, kiuj poste rekonstruis la landon kaj laboris por ĝia progreso. Kiam en mia urbo Kijivo aperis Universitato de la Tria Aĝo, mi tuj min turnis al la rektorino kun peto pri la permeso fondi la unuan E-fakultaton en Ukrainio. Kaj do de aprilo 2010 mi instruas al tiu kolektivo, kiu konsistas nur el pensiuloj – de 55- ĝis preskaŭ 80-jaraĝaj. Mi neniam strebas al granda kvanto de studentoj,

ĉar neniu alia esperantisto ĉi tie volas labori kun grupo de pensiuloj, kaj mi persone pro mia sanstato ne povas instruadi al multaj homoj. Ĉiujare bedaŭrinde mi devas adiaŭi 1-2, iam 3 personojn, kiuj fariĝas tro maljunaj kaj tro malsanaj kaj ne kapablas veturi al la lecionoj (mi mem preskaŭ ĉiumonate veturadas por renkontiĝi kun ili persone) kaj anstataŭigi ilin per novuloj.

Laŭ mia opinio maljunuloj, des pli kiam ili suferas pro malriĉeco, malsanoj, nesufiĉa estimo en la familio, devas fariĝi plenaj de viva energio kaj senco de vivo, ili devas fariĝi optimistoj, aktive laborantaj por sia bono kaj por fari multe da bono por la aliaj. Por atingi tiun celon, mi en la E-fakultato ne nur instruas la internacian lingvon, sed ankaŭ la historion de la E-movado, interesajn informojn pri aliaj landoj; mi instruas verki beletrajn rakontojn, prelegojn, versaĵojn, ĵurnalistajn artikolojn, scenarojn de festoj, ekskursojn. Ankaŭ kanti, aktori, eĉ ludi muzikilojn kaj fari manfaraĵojn, prestidigitaĵojn (magiaĵojn). Ni vizitas muzeojn (kun urboludoj), teatrojn, koncertejoj, ekspoziciejoj, veturas al aliaj urboj. Kiuj havas sufiĉe da mono, kun grandega plezuro veturas al eksterlandaj E-aranĝoj.

Apartan ĝojon donas la vortoj de la maljunaj homoj, ke ili, longe loĝantaj en la urbo, neniam antaŭe vizitis multajn vidindaĵojn, kiujn ili ekvidis nur dank' al tio, ke ili studas en la E-fakultato.

Kutime la studentoj mem elektas, kien ni iru, aŭ kiun festadon ni organizu aŭ al kiu urbo ni veturu, mem preparas la E-lingvajn materialojn anticipe. Ni preparas iujn kunvenojn por la Kijiva E-klubo „Ora Pordego”, renkontiĝas kun e-istoj el aliaj niaurbaj E-kolektivoj, ĝoje renkontiĝas kun alilandaj gastoj. Bonfare ni preparas diversajn nacilingvajn seriozajn kaj gajajn aranĝojn por vizitantoj de bibliotekoj. Se maljunuloj pli aktivas en la vivo, ili certe estos pli feliĉaj.

Mi revas pri tio, ke ankoraŭ iu ĉi tie ekokupiĝu pri grupoj de maljunuloj kaj ni kune multobligu niajn rezultojn; sed dume ĉiuj aliaj instruas E-on nur al junularo kaj ties rezultoj ne malofte estas malpli grandaj ol la rezultoj de la maljunuloj. Nun mi preparas unu mian lernantinon al instruado; ŝi estas tiom feliĉa pri la E-lernado, ke ŝi volas al ĉiuj helpadi, por ke aliaj aliĝu kaj ĝuu. Estas videble laŭ la rezultoj de la pensiuloj, ke ili fariĝas multe pli ĝojaj en sia malfacila aĝo. Ili fariĝas aktivaj membroj de la Kijiva E-klubo „Ora Pordego”, aktivis en la antaŭaj aranĝoj „Aroma Jalto”, nun en „Mirinda Lviv”. Ofte neniu alia donas al ili tiom da bonkoreco kiel e-istoj, nenio alia donas tiom da novaj bonaj ĝojigaj impresoj kiel la studado en la E-fakultato. Mi tre forte volas aldoni al ilia vivo tiom da bono, kiom mi povas, ilia kontento kaj plezuro reeĥe venas al mi. Tiuj pensiuloj havas diversajn aĝojn,

profesiojn kaj hobiojn, sed la lingvo Esperanto kunigis kaj feliĉigis ilin farinte optimistoj, kiuj aktive kreas sian vivon kaj bonkore helpas al la aliaj. Mi volas mencii la rezultojn de du el miaj novaj lernantinoj, kiujn mi akceptis. Tiuj du novaj pensiulinoj post kvin lecionoj povas dialoge kaj monologe paroli laŭ temoj „Pri mi”, „Mia familio”, „Lernoĉambro”, „Loĝejo” kaj ili povas skribi 1-paĝajn verkojn laŭ la temoj. Ili kun aliaj miaj lernantoj partoprenas aktive, ion prezentante, en du renkontiĝoj por aliaj kivitaj E-kolektivoj (por spertuloj, ne komencantoj) en Zamenhof-Festoj kaj la Novjara Festo kiujn ĝuste mi kun miaj lernantoj preparis speciale por tiuj kluboj.

Ni tre ŝatus ekkontakti kun alilandaj pensiuloj kolektive aŭ individue, ni kun plezuro interŝanĝos spertojn kaj interhelpados pri la lerno de la lingvo.

Noto de Mirejo GROSJEAN:

Prave nia koleginino Svetlana substrekas, ke multaj el ni preferas instrui al gejunuloj por junigi la movadon. Sed mi konas kelkajn esperantistojn, kiuj venis al nia lingvo pro la entuziasmo kaj/aŭ spertoj de avo aŭ avino...

En Eŭropa Unio estas programo Erasmus Plus, „Long life learning”, lernado tra la tuta vivo. Ni iru laŭ tiu vojo.

El la landoj kaj sekcioj...

Finnlando

Carola ANTSKOG 1941-2015

La lasta tago de la jaro 2015 iĝis la lasta tago de la vivo de Carola ANTSKOG pro grava malsano. Carola eklernis Esperanton kune kun sia filino Anna RITAMÄKI-SJÖSTRAND en la 80aj jaroj. La nepino, filino de Anna, konatiĝis kun la internacia lingvo kune kun la avino kaj patrino kaj jam partoprenis la Universalan kongreson en Lille.

Carola ANTSKOG profesie estis instruistino, kaj ŝi estis membro de ELFI, E-Ligo de Finnlandaj Instruistoj. Ŝi estis elektita ĝia prezidanto por 2001-2008. Dum tiu tempo ŝi aranĝis trifoje en 2004-2006 vojaĝojn de gimnazianoj al Strasburgo dum t.n. Euroscola-tago en la ejo de la Eŭropa Parlamento. Tie la finna grupo havis komunajn programojn kun alilandaj



esperantistaj gimnazianoj, kiujn gvidis Carola kaj kiuj nomiĝis Eŭropaj amikeco-Seminarioj. Antaŭ tiuj okazoj Carola ekzercis la lernantojn prepariĝi en la lingvouzo.

La hejmo de Carola estis malnova lernejo. Tie ŝi aranĝis plurajn renkontiĝojn kaj por infanoj kaj lernejanaj kursojn/kursetojn. Ĉar en la konstruaĵo povis tranokti eĉ pluraj homoj, Carola gastigis turistajn eksterlandajn buskaravanojn, ofte esperantistajn. Ankaŭ esperantistoj, kiuj faris preleg- aŭ aliajn vojaĝojn en Finnlando, haltis en la suda Finnlando ĉe Carola.

Tra Skolta Esperanto-Ligo, Carola disvastigis la scion pri Esperanto eĉ kiel ĝia prezidanto. En la loka gazeto oni povis legi rakontojn pri ekz. Universalaj Kongresoj kaj multaj eksterlandaj gastoj.

Carola Antskog trapasis la mezan UEA/ILEI-ekzamenon en 1999 kaj kompletan C1 KER-ekzamenon en 2013. Ŝi estis membro de kelkaj lokaj E-societoj. Carola ANTSKOG estis aktiva en la municipa deputitaro kaj agado. E-Ligo de Finnlandaj Instruistoj kondolencas al Anna kaj ŝia frato kune kun la familioj.

Sylvia HÄMÄLÄINEN

Kroatio

Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo

Honore al la Tago de Bjelovar e-istoj el Kroatio organizis la 3-an Deklamkonkurson la 20-an de septembro 2015, en la urbo, kies urbestro diris, ke E-oriciĝas la kulturon de la urbo. Ĝi estis organizita kunlabore de Bjelovara Esperantista Societo kun Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto el Zagrebo. Partoprenis ĝin junaj esperantistoj, gelernantoj de elementaj lernejoj kaj mezlernejoj. Ili deklamis originalan Esperantan poezion kaj kroatan poezion tradukitan en Esperanton.

En la kategorio „gejunuloj” partoprenis: Tajana KUDUMIJA el Bjelovar, Marija VEŠNIK el Zagrebo, Franka kaj Adrijan MURTIĆ el Rab, Antonio VRBANČIĆ kaj Marko VRANIĆ el Đurđevac. En la kategorio „plenkreskuloj” deklamis Mihaela CIK.

La ĵurio konsistanta el tri membroj: Radenko MILOŠEVIĆ, Franjo FORJAN kaj Grozdana GRUBIŠIĆ elektis la laŭreatojn: 1. estis Antonio VRBANČIĆ, 2. estis Marija VEŠNIK kaj 3. Tajana KUDUMIJA.

Ĉiuj partoprenantoj ricevis la libron *La trajno en la neĝo* de nia fama verkisto Mato LOVRAC. La laŭreatoj ricevis diplomojn kaj medalojn.



Sekvis la komuna fotado. Daŭrigo de la programo okazis en la ejo de Češka Obec, kun ĉeĥa kultura programo kaj komuna tagmanĝo. Per E-o ni kunigis la kulturojn kroatan kaj ĉeĥan kaj kreis novajn ligojn inter la du nacioj.

Marija JERKOVIĆ

Pollando

Raporto pri la interlingvistika sesio en UAM

Milda februara vetero akceptis la persistajn partoprenantojn de la 4-a interlingvistika sesio en la poznana universitato (30.01-05.02.2016). Ne nur komence, en septembro 2014, la grupo estis rekorda, sed ankaŭ nun ĝi estas tia: 17 studentoj (5 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando kaj po unu el Belgio, Ĉeĥio, Kroatio, Rusio, Serbio kaj Svedio) progresas en siaj studoj pri interlingvistiko kaj esperantologio.

Ĉi-jare d-ro Ulrich LINS, aŭtoro de *La danĝera lingvo*, prezentis la movad-historion de Zamenhof ĝis post la dua mondmilito kun multaj interesajoj. La aliajn tri kursojn gvidis d-rino Ilona KOUTNY engaĝante la studentojn en diskutojn kaj ludojn. Kadre de aplikata lingvistiko temis pri leksikografio, lingva planado, multlingvismo kaj denaskismo ĝis komputa lingvistiko.

Kontribuis ankaŭ d-ro Marc BAVANT pri terminologio kaj d-ro Zbigniew GALOR pri lingvo kaj socio.



La tria semestro de Esperanta gramatiko prilumis la riĉecon de Esperanta leksiko inklude frazeologiaĵojn kaj tiklajn punktojn de vortfarado. Ilona KOUTNY traktis la problemojn de lingvotavoloj, skizis la evoluon de E-o kaj la lokon de E-o laŭ lingvotipologio. Enkadre de pragmatiko, preskaŭ ne-esplorata tereno koncerne E-on, okazis diskutoj pri kutimoj de lingvouzo (alparoloj, petoj kaj aliaj ĝentilecformoj) por serĉi normojn kaj limojn de komunaj scioj kaj eblaj supozoj en internacia parolkomunumo.

La merkreda *komuna vespero* estis bonetosa: ni aŭdis tradukitajn poemojn de Suso kaj kantojn de Suzana, krome informojn pri la elementa lernejo, kie komenciĝis instruado de E-o kunlabore kun la Interlingvistikaj Studoj. Post la sesio, sabate okazis ekskurso al Vroclavo, kiu estas ĉi-jare *eŭropa kultura ĉefurbo* kaj gastigos la IJK-n. Lokaj e-istoj kaj partoprenantoj de la universitato de la tria aĝo akceptis kore la grupon.

Ilona KOUTNY

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Rumanio

Hieraŭ ni komencis instrui Esperanton en la elementa lernejo Românești-Grănicești, distrikto Suceava. La grupo konsistas el dek kvin gelernantojn el la klaso kvina kaj sesa .

Nia celo estas instrui Esperanton per klasika metodo kaj por ke la kurso estu gaja, ĉar ni estas kantistoj, ni kantas Esperantajn kantojn, ni estas aktoroj kaj ludas rolojn en nia Esperanto-pupteatro, ni estas vojaĝantoj kaj vojaĝas en Esperanto-lando.



Ionel BODALE

Rusio

Ekde la 3-a ĝis la 5-a de januaro en la rusia urbo Jekaterinburgo okazis lingvotrejnado pri E-o. La aranĝo estis organizita en la kuracgastejo „Uktus”, kie dum nia ĉeesto malestis aliaj gastoj. Pro tio la tuta ejo estis je nia dispono. Tio certe kreis komfortajn kondiĉojn kaj por instruistoj kaj por lernantoj. La celo de la aranĝo estis subteni komencintojn, kuraĝigi ilin por ke ili ne ĉesigu la lernadon de la neŭtrala lingvo, kaj konatigi ilin kun la bazaj aspektoj de la movado entute, montrante al ili, ke E-o estas ne nur lingvo, sed ankaŭ tre pozitiva internacia agado. Krome, la organizantoj celis profundigi lingvokonon de progresantoj, kiuj ankaŭ ĉeestis. Unu el la plej rimarkindaj aferoj estis la graveco de la instruteamanoj, venintaj por dividi siajn spertojn kun komencantoj kaj progresantoj. Ĉi tie estis Vladimir OPLETAJEV – filologo kaj aktivulo de Ural-Siberia esperantista movado, Irina GONĈAROVA – moskva esperantistino el e-ista familio, gvidantino de la moskva E-klubo MASI. Do, entute la instruistaro kaj movadrepresentantaro estis tre interesaj kaj ebligis diversflankan kaj abundan demonstradon de la movado al lernantoj, kiuj siavice rivelis laŭdindan scivolemon kaj interesiĝon. Estas ankaŭ tre grave kaj ĝojige, ke venis novaj antaŭe nekonataj personoj, kio evidente montras aktualecon kaj necesecon de instruista agado, malgraŭ asertoj de skeptikuloj pri nevivkapablo de Esperantujo. Dum la aranĝo la komencantoj kaj progresantoj povis plibonigi siajn lingvokonon en du grupoj: A kaj B respektive. Kelkaj lecionoj eĉ postulis plenumon de hejmtaskoj, kiuj estis dissenditaj al la partoprenantoj antaŭ kelkaj semajnoj. Ĉiu leciono daŭris unu horon kaj dumtage oni aranĝis de tri ĝis ses lecionojn.

Verdire niaj ĉi-fojaj lernantoj certe meritas apartan mencion, ĉar dum nur tri tagoj de la aranĝo ili rivelis rimarkeblan sukceson. Ĉi tie per siaj propraj okuloj oni povis vidi homojn, kiuj sukcesis jam sufiĉe bone konatiĝi kun la lingvo dum kelkaj monatoj. Tre kortuŝa estas la ekzemplo de novulino, kiu nomiĝas Margarita. Tio estas junulino nevidkapabla, kiu lernadis la lingvon tute memstare dum preskaŭ du monatoj antaŭ la trejnado kaj venis Jekaterinburgen jam povante interparoli kun aliaj en Esperanto. Certe ne tiom lerte kaj flue, kiel pli spertaj samideanoj, sed la fakto mem, ke tiu celstreba esperantistino tiom rapide kaj volonte progresas, vere instigas nin kredi je la spiritforto de la homo.



Krom lecionoj, estis okazigitaj ankaŭ ludoj, amuziĝprogramoj, bankedoj. Fine de ĉiu tago la partoprenantoj povis ĝui vesperan amikan etoson aŭskultante E-lingvajn kantojn de Kore, Jonni-M kaj aliaj. Post la trejnado ĉiuj dezirantoj povis partopreni ekskurson tra la urbo Jekaterinburgo. La ekskurson gvidis loka esperantistino, kiu ne ĉeestis en la trejnado, sed aranĝis tute profesian kaj informoplenan urbomontradon.

Oni povas sincere konstati, ke tiu nuna trejnado donis al ni novan ondon de inspiro kaj deziro denove antaŭenigi nian aferon pli kaj pli..

Kirill NOVIĈENKO

Serbio

Pentroarto en E-kulturo: Sukcesoj de serbiaj gejunuloj en Triesto



Kvar gelernantoj el Subotica (Serbio) partoprenis en la internacia konkurso pri dulingvaj pentraĵoj *Premio Liliana Cernecca Soranzo 2015*, kiun organizis Triesta E-Asocio la duan fojon. Laŭ la konkursa regularo, je libera temo kaj iu ajn tekniko, ĉiu verko devis enteni tekston de almenaŭ unu vorto: en E-o kaj en unu el la lingvoj de Eŭropa Unio. Entute 12 pentraĵoj el Italio, Slovenio kaj Serbio estis prezentitaj dum unusemajna ekspozicio, 28/11–5/12/2015. El Serbio partoprenis tri lernantoj de la Politeknika Lernejo de Subotica: Beatrix CVITKÓ,

Blanka LÁSZLÓ kaj Emese KOVÁCS PÉCSKAI, anoj de la E-fakrondo. Iliaj mentoroj estis Zita SUHAJDA, profesorino de pentroarto, kaj Aranka LÁSZLÓ (LASLO), gvidanto de la E-fakrondo. Al ĉi tiu grupeto aliĝis la 13-jara Dávid LÁSZLÓ, lernanto de la 7-a klaso de la elementa lernejo „Ivan Goran Kovačić” el Subotica, frato de Blanka.

La lastan tagon, dum solena aranĝo, estis publikigita la decido de la ĵurio, konsistanta el: Renata DAMIANI, pentristino kaj skulptistino, Alessia FAVRETTO, psikologino, kaj Oscar Garcia MURGA, mediisto.

La unua premio ne estis aljuĝita. La 2-an premion ricevis Emese KOVÁCS PÉCSKAI (Ĉantavir, Serbio) kaj Bossi AREDO (Trieste, Italio) – 250 eŭrojn egalmerite dividitajn en po 125 eŭrojn. La bildo kreita de Emese portis mesaĝojn: *Savu vivon de la arbaro por viaj genepoj! – Menstd meg az erdőt az unokáid számára!* [ŝian pentraĵon vidu supre] Laŭ la juĝo de la ĵurio ŝi estas premiita „pro la delikateco de la bildo, klare elvokanta la nepran neceson protekti la naturan medion”.

La 3-an premion gajnis Giordano PREDONZAN (Trieste, Italio) kaj Blanka LÁSZLÓ (Subotica, Serbio). Ili ricevis po 75 eŭrojn. Blanka, kiu mem ludas violonĉelon, desegnis instrumenton kun la citaĵo de Zoltán KODÁLY, hungara komponisto: *La muziko apartenu al ĉiu! – Legyen a zene mindenkié!*

La ĵurio ŝian verkon laŭdis „pro la mozaika enhavo de la universaleco de muziko, lingvaĵo de l' animo”.



En la kategorio sub 14 jaroj la antaŭvidita Speciala Premio ne estis asignita pro manko de konkurstantoj. Tamen Dávid LÁSZLÓ (Subotica, Serbio) ricevis „Specialan Mencion” (kaj 50 eŭrojn) „pro la filozofia fono de la desegnita bildo kaj skribitaj vortoj”. Kiel temon li elektis la proverbon: *Rapidu malrapide! – Lassan járk, tovább érsz! (vd. apude)*

La gejunuloj el Subotica estis stimilitaj partopreni la internacian konkurson, kaj ni esperantistoj el Subotica estas tre fieraj pri ili, kaj same iliaj lernejoj!

Dankon al Marija Nikolaja ROŽEJ (Nika) el Slovenio, kiu instigis nin partopreni, kaj al la organizantoj, precipe al s-ino Elda DOERFLER pro la elstara komuniko rilate al la konkurso.

Aranka LASLO

Tajlando

E-kurso en Bangkok

Laŭ la propono de LEE Jungkee, respondeculo pri la azia movado en la estraro de UEA, d-ro MÁRKUS Gábor (el Hungario) gvidis sukcesajn E-kursojn en multaj universitatoj kaj supermezlernejoj en Koreio kaj Tajlando.

En 2014 li organizis la E-instruadon en la nove fondita Indramang-Universitato en Koreio kaj tie li verkis specialan ekzercaron por la orientaziaj studentoj. En 2015 li gvidis tri kursojn en Seulo kaj prelegis en la seula kaj la suwona kampusoj de la Kyunghee-Universitato por doni motivon al la studentoj studi E-on en la Humanisma Fakultato.

En januaro 2016 li gvidis E-kurson per sia speciala instrumentado ankaŭ en la Srinakharinwirot-Universitato en Bangkok, Tajlando, kie dek studentoj komencis konatiĝi kun la internacia lingvo kaj kun la zamenhofa penso. En la bildo la tajlandaj kursanoj videblas en la klasĉambro kaj antaŭ la konstruaĵo de la Pedagogia Fakultato de la universitato.

[*vd la foton sekvapaĝe*]



Usono

NASK kaj la Kino-Teatro-Festivalo (KTF) denove kunigas programojn en 2016 ĉe la Universitato William Peace (WPU) en Raleigh, Nord-Karolino! Kiel en 2015, KTF okazos ĉe WPU dum la unuaj kvin tagoj de NASK, tiel ke la partoprenantoj de ambaŭ eventoj povu partopreni en la komunaj aktivajoj.

La partoprenantoj de KTF povas enskribiĝi aŭ por la unuaj kvar tagoj de NASK, aŭ por la tuta kursaro! NASK okazos inter la 28-a de junio kaj la 7-a de julio (studentoj alvenos la 28-an de junio, lecionoj okazos de la 29-a de junio ĝis la 6-a de julio, kaj ĉiuj foriros la 7-an de julio) kaj KTF inter la 28-a de junio kaj 3-a de julio (alventago estas la 28-a de junio kaj forirtago la 3-a de julio).

Estos ok tagoj de lernado plus la ŝanco partopreni en la teatraj aktivajoj kaj vidi la finan produkton de la metiejoj de KTF. Estos ankaŭ diversaj aliaj aktivajoj: esplorado de la belaj muzeoj, butikoj kaj restoracioj de la urbo, ĉio en piedira distanco de la kampuso.

Ambaŭ grupoj povos partopreni la nacian feston de la 4-a de julio, kun pireteknikaĵoj!

La bazaj kostoj por NASK \$760, KTF +4 tagoj de NASK \$430. Estas aliaj ebloj.

Petu la registrilon ĉe: eddyellen@aol.com.

Granda fasko, grava paŝo

28 dokumentoj, 480 g



Laŭ decido de la ILEI-Komitato en 2014 kaj en 2015 ILEI devas provi reakiri sian statuson de NeRegistara Organizo ĉe Unesko. Cele al tio mi preparis dosieron. Jen kelkaj notoj pri ĝia enhavo.

Unue aperas la kandidatiĝa dokumento, vasta demandaro kun detalaj respondoj.

Poste venas nia statuto kaj agadraportoj pri la lastaj du jaroj. Unesko volas scii, de kie venas nia mono; do financa raporto aperas. Prezento de niaj du revuoj IPR kaj JA, detala priskribo de la Estraro, listo de niaj sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj, kongruenco de la celoj de Unesko kun la celoj de ILEI ne mankis.

Mi aldonis ampleksan demandaron, kiun Unesko sendis al la NRO-oj kaj kiun ni memstare kaj libervole plenigis kaj sendis. Mi aldonis detalajn raportojn pri kursoj por afrikaj virinoj (kun fotoj tuj videblaj sur la unua paĝo).

Mi eĉ ricevis en Togolando stampan atestilon, ke ILEI partoprenis en seminario por Aktivula Maturigo kunlabore kun la reto de Unesko-asociitaj lernejoj en Togolando; tia



dokumentoj kompreneble foriris kun la kandidatiĝo. Dokumentoj kun foto de la ŝildo en Montevideo: „UNESKO-ESPERANTO 60 jarojn kune”, dokumentoj pri mia kurso pri konflikto-solvado en E-o laŭ la slogano de Unesko „Krei la ideon de paco en la menso de viroj kaj virinoj”, dokumentoj pri ceremonio en Kinshasa okaze de agnosko de la Landa Asocio fare de la

nacia kongolanda Unesko-Komisiono, raporto pri la laboro de LEE Jungkee en la Unesko-kunsido en Seŭlo en 2015 aldoniĝis.

En diversaj lokoj mi emfazis pri la paralela agado de ambaŭ institucioj. Tion, kion mi mem verkis, mi faris en la franca. „Raportoj kaj statuto”, kiuj ekzistis antaŭe en E-o, tradukis d-ro Ronald GLOSSOP; li ricevu ĉi tie miajn plej elkorajn dankojn. Kelkajn dokumentojn mi lasis dulingvaj: Esperanta teksto verde printita, traduko al la angla nigre printita; tiel iu povas rapide eklegi en la angla kaj povas laŭplaĉe iom rigardeti al la E-lingva originala teksto.

Laŭ la postuloj de Unesko tia kandidatigo iru al la Ĝenerala Direktoro en la ĉefa sidejo de Unesko en Parizo; tiun oficon nuntempe plenumas S-ino Irina BOKOVA el Bulgario. Tiel mi faris la 14-an de januaro. Ni estas en atendo.

Ni notu, ke ekde 1954 UEA havas tian statuson de NRO ĉe Unesko. Tuj kiam TEJO havos sian juran memstarecon, nia junulara organizo faros la saman paŝon.

Mireille GROSJEAN

Raporto de ILEI-reprezentantoj ĉe UNESKO 2015

La 38a Ĝenerala Konferenco de Unesko okazis en Parizo de la 3-a ĝis la 19-a de novembro 2015. Kiel kutime ĝi komenciĝis per la debato de ĝenerala politiko kaj 194 ŝtatrepresentantoj petis parolvicon. La ĉefaj temoj rilatis al la celoj 2015-2030: daŭripova evoluigo, klimataj ŝanĝigoj kaj iliaj konsekvencoj (Unesko partoprenis al la pretigo de grava renkontiĝo en Parizo: COP21) altkvalita edukado por ĉiuj kun bone trejnitaj instruistoj, protektado kaj promociado de kultura diverseco kaj de monda heredaĵo, rajtoj sin esprimi, protektado de ĵurnalistoj...

Ekde la komenco merkrede matene la reprezentantoj de ILEI – Monique ARNAUD kaj Jean-Pierre BOULET – rondiris en la salonego kaj disdonis pli ol 250 flugfoliojn al proksimume 50 delegacioj dum la semajno. Tiun jaron ni strebis alparoli homojn en ilia gepatra lingvo ĉiam, kiam eblis. Niaj dokumentoj estis tradukitaj al 14 lingvoj; tiel ni same faris kiel UEA. Danke al tiu farmaniero ni kontaktis izolitajn homojn, kiuj ofte malkovris la internacian lingvon kaj montris grandan intereson. La reprezentantoj surpodie foje uzis sian gepatran lingvon, tiel ni aŭdis la turkan, la portugalan, la serban, la germanan. La angla lingvo estis uzita proksimume cent fojojn, la franca 50 fojojn; la reprezentantoj de kelkaj delegacioj uzis ambaŭ lingvojn. Daŭre pri lingvoj, ni aŭdis 15 fojojn la araban, 14 fojojn la

hispanan, 3 fojojn la rusan kaj 2 fojojn la ĉinan; parolis ĝin ne nur la reprezentanto de Ĉinio, sed ankaŭ la ĉina eksprezidanto de la 37-a Ĝenerala Konferenco.

Danke al UEA budo estis starigita kaj Renée TRIOLLE prezentis la lingvon. Ne ĉeestis multaj homoj, sed ni disdonis multe da informiloj al preterpasantoj. Deĵoris F. Lo Jacomo, R. Triolle, Sasha por UEA, J. P. Boulet kaj M. Arnaud.

Monique ARNAUD

Germain PIRLOT proponas tiun tekston al niaj priprenoj

*Laŭ la UNESKO-slogano: **krei pacon en la spirito de ĉiuj homoj***

Ĉarto de reciproka respekto

Vi kaj mi vivas en interrilato, kiun mi estimas kaj kiun mi deziras gardi. Tamen, ĉiu el ni restas malsama kun siaj propraj bezonoj kaj kun la rajto klopodi kontentigi ilin. Sincere mi klopodos konsenti pri via konduto, kiam vi klopodos kontentigi viajn bezonojn aŭ kiam vi spertos malfacilaĵojn por fari tion.

Kiam vi komunikos al mi tiujn malfacilaĵojn, mi klopodos aŭskulti vin simpatie kaj tolereme, por helpi vin trovi mem solvojn, anstataŭ dependi de miaj. Kiam unu el miaj agadmanieroj malebligos kontentigi viajn bezonojn, mi kuraĝigos vin diri al mi klare kaj sincere tion, kion vi travivas. Tiam mi aŭskultos kaj klopodos ŝanĝi mian agadmanieron, se mi povas.

Krome, kiam via agadmaniero malebligos al mi kontentigi miajn bezonojn, kun ia malpardonemo al vi, mi sciigos miajn sentojn plej eble malkaŝe kaj sincere, ĉar mi fidas, ke vi sufiĉe respektos miajn bezonojn por aŭskulti min kaj ŝanĝi vian agadmanieron.

Kaze de neebleco ŝanĝi nian agadmanieron por ebligi al la alia kontentigi siajn bezonojn, kaj kiam ni konstatos, ke nia rilato suferas pro konflikto de bezonoj, ni devontigu nin solvi tiajn konfliktojn neniam uzante nian povon por klopodi venki koste de la alia. Mi respektas viajn bezonojn, kaj ankaŭ vi devas respekti la miajn. Sekve, por niaj neeviteblaj konfliktoj, ni klopodu ĉiam trovi solvojn konvenajn por ambaŭ. Tiel viaj bezonoj estos kontentigitaj kaj ankaŭ la miaj: neniu malgajnos, ni ambaŭ gajnos.

Tiamaniere vi daŭre povos ekflori kiel persono klopodante kontentigi viajn bezonojn kaj same por mi. Tiam nia rilato povos ĉiam resti sana, ĉar reciproke ni eltiros kontentigon. Ĉiu el ni povos iĝi tio, kio li aŭ ŝi kapablas iĝi, kaj ni povos daŭrigi nian rilaton en sento de reciprokaj respekto kaj amo, en amikeco kaj paco.

Thomas GORDON („*Un credo pour mes relations avec les jeunes*” / „Kredo por miaj rilatoj kun junuloj”, en „*Une autre écoute de l'enfant*” / „Alia maniero aŭskulti infanon”)

http://humanismepur.free.fr/communication/respect_mutuel.php

Nia Koleg-helpa Kaso (KhK) bezonas vin!

Jen elkora kaj energia alvoko, forta voko al la tuta Ligo.

Vi povas facile imagi, ke multaj instruistoj de Esperanto en diversaj evolulandoj ne povas pagi sian kotizon. Tamen ili ŝatus membri en la Ligo kaj legi nian organon *Internacia Pedagogia Revuo* IPR. Plie la transpago ne estas facila, aŭ tute ne ebla, eĉ se mono estos. Plie revuoj, gazetoj, legaĵoj enorme mankas, tion mi rimarkis en Afriko. Imagu: okaze de ekzamensesio la kandidato devis priskribi bildon; tiu bildo estis foto, amuza foto, kolora foto. Fine de la ekzameno la kandidato flustre demandis min: ĉu mi rajtas konservi tiun belan foton? Mi jesis. Certe tiu foto nun ornamas lian ĉambron. Tian situacion ni povas nur pene imagi.

Komence de 2016 kandidatoj por membri danke al nia Kaso estas 66 personoj el Afriko, Azio kaj Ameriko.

Do se eblas por vi, bonvolu pripensi pri donaco al nia Koleg-helpa Kaso. Se vi intencas fari tiun paŝon, bv ĝiri vian donacon al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a kun indiko: por Koleg-helpa Kaso. Niaj kolegoj el evolulandoj dankas al vi.

Konferenca programo kaj konferencaj servoj

Fake kaj distre

La programo de la Konferenco de ILEI celas plenumi diversajn bezonojn kaj preferojn de la organizaĵo kaj de ĝiaj membroj kaj gastoj: organizajn, klerigajn, lertigajn, eduk-sciencajn, kulturajn, turismajn, distrajn. La konferenco flegas etoson de neforgesebla amikeco kaj proponas al la partoprenantoj podion por prezenti siajn labor- kaj esplor-rezultojn, diskutigi siajn temojn kaj interŝanĝi spertojn.



La 49-a konferenco en Nyíregyháza enkondukos kelkajn novaĵojn en la konferencan programon, tamen ĝi sekvos la tradician ILEI-konferencan programskemon kun la ĉeffadenoj organiza, faka kaj distra, kun la tradiciaj programeroj menciitaj en la pasinta numero de IPR inkluzive de kursoj, seminarioj, laborkunsidoj, lingva festivalo, simpozio, vesperaj programoj k.c. Por partopreni konferencajn kursojn kaj seminariojn, aŭ la simpozion, ne necesas pagi apartan kotizon – la konferenca kotizo inkluzivas ĉion tion.

La kutimo estas por la *Interkona frandvespero*, la unua konferenca programero (sabato, 30 julio), ke la konferencanoj kunportas iujn tipajn manĝaĵojn kaj/aŭ trinkaĵojn el sia kulturo, ion kio povas sekure elteni la longan vojaĝon kaj ne tro ŝarĝi la valizon. Tio aldonas manĝkulturan segmenton al la interkonatiĝo de diverslandaj gekolegoj kaj donas al la konferenco specifan etoson de interkultura proksimiĝo. Similan efikon, per aliaj rimedoj, havas la duontaga lingva festivalo. Se vi deziras prezenti vian lingvon en la lingva festivalo kaj/aŭ alimaniere kontribui al la faka kaj kultura programo, bonvolu indiki tion en via aliĝilo.

Nacia vespero

La programon de la *Nacia vespero* (dimanĉo, 31 julio) plenumos popoldanca grupo, muzikisto kun citro kaj kantistino el la konferencurbo, fama en la tuta lando. La citristo kantas hungarajn popolkantojn en Esperanto kaj kantigos ankaŭ la konferencanojn.

Diskuttrondoj, interkonsiliĝoj, laborgrupoj

Krom la ĉiujaraj komitatkunsidoj, ILEI-anoj dum la konferenco traktos diversajn fakajn kaj organizajn demandojn el la vivo de la Ligo tra laborgrupoj, diskuttrondoj, interkonsiliĝoj kaj similaj formoj, ekz.:

- Laborgrupo: „Jaro de la Lernanto”
- Interkonsiliĝo kaj prezentiĝo de E-centroj: spertoj, ofertoj, perspektivoj
- Kolokvo pri universitata instruado de Esperanto kaj interlingvistiko: atingoj kaj perspektivoj
- Laborgrupo/diskuttrondo: „Esperanton en lernejoj”
- Diskuttrondo: E-instruistaj spertoj



Busto de Kalocsay en Abaújszántó

E-kursoj

En la E-kurso por komencantoj kaj paroliga kurso por progresantoj ne nur kreĝos kaj lingve plilertiĝos novaj esperantistoj, sed ankaŭ la partoprenantoj de E-instruista trejnado povos praktiki siajn provleciojn. La kursojn gvidos instruspertaj konferencanoj po 2-4 horoj ĉiutage. Se vi deziras prelegi en la kursoj, aŭ venigi al la konferenco grupon de kursanoj, aŭ mem partopreni kiel kursano, bonvolu indiki tion en la aliĝilo.

Se vi organizos kaj aligos al la konferenco grupon de komencantoj aŭ komencintoj, vi ĝuos kotizrabaton kiel grupgvidanto: 50% de la kotizo se vi gvidas minimume trimembran grupon, 75% por kvarmembra kaj 100% por kvinmembra aŭ pli granda grupo.

Grave: Bonvolu prizorgi kaj helpi viajn grupanojn, ke ili ĉiuj aliĝu al la konferenco, mendu la loĝadon kaj sendu la pagon ĉu pere de vi, ĉu al konto de ILEI.

Instruista trejnado kaj interŝanĝo de spertoj

Faka trejnado, konsiloj kaj lertiĝado estas servo, kiun ILEI ŝuldas al siaj membroj kaj partneroj. Metodikaj trejnseminarioj dum ILEI-konferencoj profitas la ĉeeston de E-pedagogoj el la tuta mondo, kiuj povas transdoni

siajn spertojn al instruemaj kolegoj tra prelegoj, ekzercoj, atelieroj, modelaj lecionoj, diskutrondoj.

Se vi deziras partopreni en la trejnseminario en Nyíregyháza, ĉu por mem lertiĝi ĉu por instrui pri certa temo, bonvolu indiki tion en la aliĝilo kaj aldonu kio vin aparte interesas. Kvankam unu-semajna trejnseminario ne donas sufiĉajn metodikajn sciojn kaj instrulertojn por akiri ILEI-diplomon pri instrukapablo, ĝi estas grava paŝo al tiu celo. Pli kompletan instrukapabligon ofertas unujara metodika kurso ĉe Interlingvistikaj studoj en Poznań kaj la reta trejnado RITE ĉe *edukado.net*. Samcele en Herzberg estas evoluigata la trejnprogramo MITE (Modula Instruista Trejnado pri E-o), kiu konsistas el unusemajnaj trejnblokoj – moduloj. ILEI planas enkonduki ĝin kiel sian trejnprogramon tiel, ke trejnatoj povos partopreni diversajn modulojn dum kongresoj kaj aliaj E-eventoj ĝis kompletigo de la tuto bezonata por akiro de la diplomo pri instrukapablo. Tiel la instrulertigado proksimiĝos ankaŭ al tiuj instruistoj, kiuj ne povas pagi vojaĝon kaj partoprenon en la trejnado en Poznań aŭ Herzberg, aŭ ne povas uzi la retajn servojn de RITE. Tio ne signifu konkurencigon de la diversaj trejnebloj, sed ilian komplementan sinergiigon por la bono de la tuta E-komunumo.



La fortikaĵ-kastela muzeo Vay en Vaja, unu el niaj ekskursceloj

MITE estos prezentita kaj diskutata dum la konferenco. Espereble la Komitato povos aprobi decidojn pri ĝiaj enkonduko kaj aplikado paralele kaj komplemente kun la ĉi-supre menciitaj kaj aliaj ebloj. Aliflanke la Estraro devus rehavi estraron pri instrukapablo, kiu nun mankas, kvankam temas pri esenca taskokampo de ILEI.

Ne nur la instrutreja seminario estos proponita al instruemaj konferencanoj. Se vi deziras lerni el spertoj de aliaj E-instruistoj, aŭ mem dividi viajn instruspertojn kun aliaj gekolegoj, planu partoprenon en diskutrondo pri E-instruistaj spertoj.

Prelegoj kaj atelieroj de konferencanoj

Krom la ILEI-simpozio, kiu estas planata por la lastaj konferencaj tagoj kaj pri kiu vi povas legi apartan alvokon en ĉi tiu numero de IPR, por la tuta konferenca semajno estas planataj ekstersimpoziaj programblokoj por prelegoj, diskutrondoj kaj atelieroj pri E-pedagogiaj kaj aliaj ĝenerale klerigaj temoj, kiujn proponos konferencanoj.

Ĝisnunaj aliĝintoj proponis kurson „Ĉendancu baladojn” kaj prelegojn pri Esperanto en Afriko, stilfiguroj kun ekzemploj el traduka E-literaturo, oftaj korektendaĵoj en E-tekstoj, spertoj el Indramang-metoda lingvo-instruado en koreaj kaj tajlandaj universitatoj, E-instruado en artlernejoj k.c.

Se ankaŭ vi deziras tiel kontribui al la konferenca programo, bonvolu sendi vian kontribuproponon kun titolo, 100-200-vorta resumo, 3 - 5 ŝlosilaj vortoj kaj ĝis 150-vorta prezento de la aŭtoro kun foto al: radojica.petrovic.rs@gmail.com ĝis la 15-a de junio 2015 (atentu, ke la limdato por simpoziaj prelegproponoj estas la 15-a de majo).

Por via prelego kaj postprelega diskuto vi disponos duonhoron. Por atelieroj kaj diskutrondoj pri difinitaj temoj vi povos disponi maksimume pri horo kaj duono. Se venos pli da proponoj ol akcepteblas laŭ la planita tempo, estos akceptitaj la plej interesaj kontribuoj.

La akceptitaj resumoj estos publikigitaj en la Konferenca Libro. Plenaj tekstoj de prelegoj kaj raportoj pri atelieroj kaj diskutgrupoj povas esti proponitaj por aperigo en IPR aŭ en la retejo de ILEI.

Literatura kafejo

Inspirite de la Esperanto-Sumoo de HORI Jasuo, kiu celas flegi kaj levi la librokulturon de la esperantistaro, Rob MOERBEEK proponis ĉiutagan programeron por komune legi, kune klarigi/interpreti tipe japanan literaturaron, aŭ elektitajn literaturfragmentojn el diversaj kulturoj. Ĝi estos aranĝita kiel *Literatura kafejo* plej verŝajne en malfruaj vesperaj horoj, kiam

malabundas aliaj programeroj, do kiam estos sufiĉa libera tempo por ĝui literaturajn perlojn. Konferencanoj, kiujn ĉi tio interesas, estas invitataj kunporti esperantigitajn fragmentojn el literaturo de sia lando por ĝuigi kaj ĝui ilin interŝanĝe kun aliaj literaturamantoj. Bonvolu indiki tion en viaj aliĝiloj por helpi planadon kaj antaŭpreparon de la kafejo.

Baladaj ĉendancoj

Unu el la unuaj aliĝintoj de la ĉi-jara konferenco, Martin STRID el Svedio, proponis kurson pri baladaj ĉendancoj kaj poste ĉiutagajn danchorojn, inspiritajn de feroaj baladoj kaj adaptitajn al Esperanta poezio kaj E-kultura medio. La kursanoj aŭdos pri la historio kaj karaktero de feroaj baladoj kaj lernos baladigi poemojn, verki novajn baladojn en Esperanto, ĉendanci, kun-kanti kaj baladestri. Enkonduko de baladaj ĉendancoj en E-eventojn signifos pliriĉigon de la E-kulturo, pliprosximigon de E-poezio al la E-popolo kaj amuzan metodon por plifirmigo de E-lingvokonoj. Kiel tiu feroa tradiciaĵo aspektas kaj sonas en la moderna tempo montras la filmeto:

<https://www.youtube.com/watch?v=DXN1c11ZyqI>

Kiel ĝi aspektas kaj sonas en Esperanto, ni spertos en Nyíregyháza.

Ekskursoj

La LKK preparas du tuttagajn ekskursojn en nordorienta Hungario per luitaj busoj kaj kelkajn variaĵojn de duontagaj ekskursoj tra la urbo Nyíregyháza kaj ĝia sallaga ban-kuracejo Sóstó inkluzive de la bestĝardeno kaj etnovilaĝa muzeo de Sóstó.



La unua tuttaga ekskurso gvidos al la vinmuzeo de Tokaj, baroka sinagogo el la 18-a jarcento en Mád, muzeo de Abaújszántó kun statuo kaj memorĉambro de Kolomano Kalocsay [vd *supre lian memortabulon*], fortikaĵ-kastela muzeo Zemplén kaj ĉokoladfabriko kun ĉokoladgustumado.

La dua gvidos rondvojaĝe tra la departemento Szabolcs-Szatmár kun vizitoj al historie, kulture kaj ekonomie interesaj vidindaĵoj: la fortikaĵ-kastela muzeo Vay en Vaja, kalvina preĝejo, fortikaĵpalaco, grek-katolika pilgrimejo Máriapócs, brandfarejo kun brandgustumado en Érpatak.

Loĝado kaj manĝoj



La universitata hotelo *Bessenyei* (*bessenyeihotel.hu*) [vd apude], kaj studenta ĉambraro Campus, kordore kunligitaj kun la konferencejo, ofertas loĝadon en 2-litaj ĉambroj, uzeblaj ankaŭ kiel unulitaj. Po du ĉambroj havas komunan enirejon kaj antaŭkoridoron kun kuirejeto, duŝejo kaj necesejo; sendrata retaliro disponebla. Loĝantoj de stu-

dentaj ĉambroj havas je dispono komunan kuirejon. Promendistance ekster la Universitato eblas rezervi ĉambrojn kun matenmanĝo en la hotelo Tölgyes (*tolgyespanzio.hu*) kaj aliaj. Tri manĝoj tage estos mendeblaj por konferencanoj en la universitata restoracio, en la sama konstruaĵo kun la konferencejo, aŭ en alia restoracio samstrate.

Konferenca Bankedo

La bankedo okazos jaŭdon vespere, la 4-an de aŭgusto, en *Ĉardo Bakforno* (*Kemence csárda*), kun hungara vespermanĝo (adaptebla ankaŭ por vegetaranoj kaj veganoj laŭmende) kaj 45-minuta muzika programo de hungara kantistino, kaj kun komuna veturo tien kaj reen per luita buso.

Transporto el Nitra

Por konferencanoj, kiuj antaŭe partoprenos la UK en Nitra, LKK organizos busan transporton al Nyíregyháza post la fermo de UK.

Prezoj kaj mendiloj

En la momento, kiam ĉi tiu teksto estas transdonata al la redaktoro, LKK ankoraŭ negocas pri prezoj, mendokvantoj kaj pagkondiĉoj. Ĝis vi havos ĝin en la manoj kaj legos, la prezaro kaj mendiloj estos publikigitaj rete kaj vi ricevos informojn pri tio tra komunikkanaloj de ILEI. Se vi ne uzas la reton, skribu al la estrarano pri konferencoj (adreso sur la interna kovrilpaĝo de IPR) por ricevi la informojn kaj mendilformularojn papere.

Pro prokrastita apero de ĉi tiu numero de IPR, ILEI plilongigas la malplej kosten aliĝperiodon ĝis la 30-a de aprilo.

Bonvenon en Nyíregyháza!

Radojica PETROVIĆ



Simpozio de ILEI

Novaj vojoj de lernado

Nyíregyháza, Hungario, 4/5 aŭg. 2016

La edukado okupas gravan lokon en la 17 celoj por la daŭropova evoluo dum la periodo 2015-2030, kiujn difinis Unuiĝintaj Nacioj (UN). Precipe grava por ILEI kiel asocio de edukantoj estas la 4-a celo:

Garantii inkluzivan kaj egalecan, bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancon por tutviva lernado.

Tio estas ankaŭ esenca intereso de ILEI. Per la simpozia temo - *Novaj vojoj de lernado* - ILEI esprimas sian volon subteni la 4-an evolucelon de UN observante ĝin en perspektivo de la lernanto kaj ties interesoj.

La egaleca bonkvalita edukado kaj tutviva lernado signifas adekvatajn kondiĉojn kaj rimedojn por lernado, egalece kaj juste alireblajn por ĉiuj bezonantoj. La teknologio ekipis la modernan pedagogion per potencaj rimedoj por kreado, disponigo kaj uzado de lernmaterialoj. La E-kursoj kaj lernfaciligaj materialoj ĉe, ekzemple, lernu.net, edukado.net kaj duolingo.com montras, ke la pedagogio de Esperanto akceptas kaj utiligas lernteknologiajn novaĵojn.

Kun la instrutekologia evoluo disvolviĝis kaj grave ŝanĝiĝis didaktikaj aliroj al la edukado: la roloj kaj interrilatoj de lernanto kaj instruanto ŝanĝiĝis, la interesoj kaj bezonoj de la lernanto estas en la fokuso, interkultura edukado fariĝis esence grava en la epoko de tutglobiĝo, ekster-institucia kaj neformala kleriĝo kaj kunlabora lernado en lernkomunumoj kaj sociaj retoj forte evoluis, la tutviva lernado fariĝis konsista parto de la ĉiutaga vivo. Ĉio ĉi signifas novajn vojojn de lernado. Kiel kaj kiom la E-pedagogio sekvas tiun evoluon? Nia simpozio celas serĉi la respondon kaj doni instigon.

La simpozio rolos ankaŭ kiel enkonduko en la Jaron de la Lernanto 2016/2017 laŭ la Strategia Laborplano de UEA por la jaroj 2013-2017, kun fokuso al moderna E-pedagogio: novspecaj bazaj kaj progresigaj kursoj en ĉiuj kontinentoj, seminarioj, konferencoj, manieroj aktivigi lernantojn, utiligado de Esperanto por edukado en vasta senco, kreskigo de kontaktoj kun

edukaj organizoj ekstermovadaj, instruista kaj aktivula trejnado por tiuj bezonoj.

Jen kelkaj sugestoj por prelegtemoj, sed sen limigo al nur tiuj ĉi:

1. Ŝanĝo de la fokuso de instruado al lernado
2. Memstareco de la lernanto
3. Kiel lernantoj povas mem organizi kaj mastrumi sian lernadon
4. Lernstrategioj
5. Rolo de la instruisto kiel helpanto por efika memlernado
6. Teknologiaj faciligoj por memlernado
7. Inkluziva edukado kaj lernfaciligoj por lernantoj kun apartaj bezonoj
8. Lernmastrumaj sistemoj
9. Pedagogiaj ŝanĝoj en novaj lernmedioj
10. Lernkomunumoj
11. Dumviva lernado
12. Universitataj vojoj de lernado
13. Perkomputila lingvolernado
14. Komputilaj programoj, datumbazoj kaj scibazoj por lernado de Esperanto
15. Celoj kaj planataj aktivaĵoj de *Jaro de la Lernanto* de UEA
16. Trejnado de instruistoj por novaj pedagogiaj paradigmoj

Se vi volas prelegi pri tiu ĉi temaro, ni tre kore invitas vin sendi al la organizantoj vian prelegtitolon kune kun resumo de 100-200 vortoj, 3 - 5 ŝlosilaj vortoj kaj ĝis-150-vorta prezento de la aŭtoro kun foto. Vian prelegproponon kun tiuj elementoj bonvolu sendi ĝis la 15a de majo 2015 al: radojica.petrovic.rs@gmail.com.

Viaj prelegoj devas esti originalaj, ne publikigitaj nek planataj por publikigo aliloke.

La lingvo de la simpozio estas Esperanto kun eblaj kontribuoj de neesperantistoj en la angla aŭ la hungara. Se la prelego ne okazos en Esperanto, la ĉeestantoj ricevos resumon en Esperanto. Por neesperantistaj partoprenantoj estos certigita prezento de Esperantaj prelegoj en la angla kaj/aŭ hungara lingvoj.

Surbaze de viaj kontribuoj ni redaktos provizoran programon, kiun ni sendos al vi, kaj vi estos petataj kunlabori por pretigo de trilingva prezento de via prelego. Viaj resumoj estos publikigitaj en la Konferenca Libro. Ni ankoraŭ komunikos al vi la kondiĉojn por publikigo de via kompleta prelego. Por la prelego vi disponos pri 20 minutoj kun 10 minutoj por diskuto.

Ni esperas vian entuziasman reagon al ĉi tiu alvoko kaj vian partoprenon en la simpozio. Bonvolu diskonigi la alvokon al aliaj eblaj interesatoj, esperantistaj aŭ neesperantistaj. La simpozio estas grava evento dum la ILEI-konferenco, kiun ni komune povos sukcese realigi. Ĉiuj aliĝintoj de la konferenco aŭtomate rajtas partopreni en la simpozio sen apartaj aliĝilo kaj kotizo. Tiuj, kiuj volas aliĝi nur al la simpozio kiel preleganto kaj/aŭ aŭskultanto, povas uzi la saman aliĝilon kiel por la tuta konferenco kaj pagi la nursimpozian kotizon laŭ la kotiztabelo kiu akompanas la aliĝilon ĉe:

https://docs.google.com/forms/d/1dBib7HGPxjeIGQAI3oHfON4COOLPz37wvmp9Cr_aYsQ/viewform
aŭ <http://www.ilei.info/konferenco/2016/Aligxilo2016.pdf>.

Bonvenon!

Estrarano pri konferencoj, Radojica PETROVIĆ

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Monique Arnaud, Synnöve Myntinnen.

Kontrola: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (Edukado ĉe Interreto): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): vd. la Jarlibron de UEA

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org.
Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI:
Stefan MacGill.
kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,
FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.
UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.
Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire**.
kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj banko-kostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona pago. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpago de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*,

tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro:** NÉMETH József, Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530.

La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando, <moerbeekr@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 10-an de marto 2016,
redaktofino por la sekva numero: la 30-an de aprilo 2016.**

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI,
Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3,
AL-1016 Tirana,
bselimi@gmail.com

Aŭstralio: Jennifer BISHOP,
24/8 Wallen Rd, Hawthorn,
AU-3122 Victoria,
bishop.jennifer699@gmail.com

Belgio: Marc CUFFEZ,
Elisabethlaan 295,
BE-8400 Oostende,
flandrio@hotmail.be

Benino: ALOFA Jérôme
Charles, 04BP0672 BJ
Cotonou, Rép. du Bénin,
alofkarlo@yahoo.fr

Brazilo: Paulo Nascentes,
Shin Ca5, Bloco 1, apto509, Ed
St Régis, 71503-505, BR-
Lago-Norte-Brasília DF
pnascentes@gmail.com
(konfirmota)

Bulgario: Mariana
GENCHEVA, Targovska 95,
BG-5180 Polski Trambesh,
maries972@yahoo.com

Burundo: Jérémie
SABIYUMVA, BP 170, BI-
Rumonge, Burundi,
ane_bur@yahoo.fr

Ĉeĥio: Jana
MELICHÁRKOVÁ, Polní 938,
CZ-696 02 Ratíškovice,
melicharkova@quick.cz

Ĉinio: GONG Xiaofeng,
School of Environmental and
Chemical Engineering,
Nanchang University, CN-
330031 Nanchang,
arko.gong@qq.com

Danio: Bent JENSENIUS
Højstrupvej 124, DK-2700
Brønshøj,
bentjensenius@gmail.com

Finnlando: Sylvia
HÄMÄLÄINEN, F.E. Sillanpään
katu 2 C 46, FI-33230
Tampere, sylvia.h@kolumbus.fi

Francio: Michel DECHY,
65 allée de la Crémaillère,
FR-59650 Villeneuve d'Ascq,
michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia KÓRÓDY,
E-Centro, Grubenhagenstr. 6,
DE-37412 Herzberg/Harz,
zsafia.korody@esperanto.de

Hispanio: Luis Eduardo
BERDOR REMON, Pablo
Iglesias 41, 4º B, ES-50018
Zaragoza,
eduardo.berdor@gmail.com

Hungario: SEREGHYNÉ
ZENGŐ Enikő, HU-4400
Nyíregyháza, Dózsa Gy. u. 14.
2/8, gastema.enjo@gmail.com

Irano: Ahmad Reza
MAMDUHI, Nr 9, K. Iraj, Kh.
Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-
Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi
IR-19166-13514 Tehran,
manduhi@gmail.com

Italio: Luigia OBERAUCH
MADELLA, via Prampolini 8,
IT-43122 Parma,
silkovojo@aliceposta.it

Japanio: ISIKAWA Tiekō,
Tate 1-6-6-103,
JP-353-0006
Siki-si, Saitama-ken,
isksanjo@ff.e-mansion.com

Katalunio: Pedro M.
MARTÍN, Arnau Gatell 2,
ES-17300 Blanes,
ileicat@hotmail.com

Kongo DR: Jackson
MAFULA MAVOM, c/o
DKEA, pf 1007, Kinshasa
Limete, RD Congo,
mavomespero@gmail.com

Korea Resp.: PARK
Yongsung,
110-dong 902-ho, Daewoo Ian
Apt. Samke-dong, Gimhae Si,
Gyeongsangnam-Do, KR-621-
750, esabpark@korea.com

Kroatio/KEL: Marija
JERKOVIĆ, Jarunska 6,
HR-10000 Zagreb,
mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Svijetlana
AKIK, Franje Malnara 52,
HR-10000 Zagreb,
ilei@hes-keu.hr

Kubo: Miguel Angel
GONZÁLEZ ALFONSO, Cádiz
No. 233 apto. 5 e/ Cruz del
Padre y Consejero Arango,
Cerro, La Habana, Cuba,

Meksiko: Carlos
HERNÁNDEZ LOARCA, Arco del
Triunfo 2019-40 San Pedrito
los Arcos, MX-76148
Querétaro México,
ilei@esperanto-mexico.org

Mongolio: Khorloo
TSERENDEJID, distrikto BZD,
82-5, MN-Ulanbator,
tserendjd@yahoo.com

Nederlando: Robert MOERBEEK,
Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE
Beverwijk, moerbeekr@gmail.com
Nepalo: Bharat Kumar GHIMIRE,
Nepala E-Asocio, G.P.O. Box, NP-
10518, Kathmandu,
nespa_bharat@hotmail.com

Norvegio: Anne Karin BONDHUS,
Morenefarefaret 8A, NO-4340 Bryne,
akbondhus@jkn.no

Pollando: Magdalena TATARA,
ul. Grzegórzecka 74/4, 31-559
Kraków, mtatara@gmail.com

Rumanio: Mihai TRIFOI,
Str. Principală, Bl.1 Ap.3,
RO-527116 Bixad/Jud. Covasna,
mihaitrifo@yahoo.com

Serbio: Radojica PETROVIĆ,
Bul. oslobođenja 36,
RS-32000 Čačak,
radojica.petrovic.rs@gmail.com

Suda Afriko: Emile MALANDA
NIANGA, PO BOX 2787 ZA-Cape
Town, emalandan@yahoo.fr

Svedio: Agneta EMANUELSSON,
Carl Ugglas väg 6, SE-641 37
Katrineholm,
agneta.emanuelsson@fro.se

Svislando: Mireille GROSJEAN,
Grand-rue 9. cp 9, CH-2416 Les
Brenets, mireille@gmail.com

Togolando: ATTIOGBE-AGBEMA-
DON B., Mensah, B.P. 39, Aneho,
TG-Lomé, abiovamensah@yahoo.fr

Ukrainio: Svetlana POGORELAJA,
ab.k. 54, u.Kijivo-35, UA-03035
Ukrainio, universitato3a@ukr.net

Usono kaj Kanado: Ronald
GLOSSOP, 8894 Berkay Avenue,
US-63136-5004 Jennings, MO,
rglossop@mindspring.com

Vietnamio: Ngyuyen THI NEP,
70, B20A, Kim Lien, Dong Ha, VN
Hanoi, Ngyuennepa9cjl@gmail.com

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida ELBAKJAN,
Moldovakan 26/2, kv.52, AM-
375062 Erevan, Lidaelb@yahoo.com

Barato/Hinda Unio: Venkatesh
REDDY, No. 216, Off Main Road,
Whitefield, IN-Bangalore 66,
Karnataka, esperovr@yahoo.co.in

Britio: Elizabeth STANLEY,
Frome House, Frome Gardens,
Stroud, Glos. GL5 4LE, UK
elistaros@hotmail.com

Ĉilio: Héctor CAMPOS GREZ,
Casilla 903, CL-3340000 Curico,
hecg@uea.org

Ganao: Alfred Kobina ARTHUR,
P.O. Box TS 404, Teshie, GH-
Accra, abaako43@yahoo.com

Islando: Loftur MELBERG
Sigurjónsson, Traðarberg 13,
IS-221 Hafnarfjörður,
lofturmsig@yahoo.de

Israelo: Gian Piero SAVIO, 13/4
Menora-str. IL-53490 Givatajim,
saviogp@zahav.net.il

Pakistano: Adeel Mahmood
BUTT, Ward No. 11, near M.C.
High School, PK-39100 Nankana
Sahib, adeelbutt84@gmail.com

Rusio: Svetlana SMETANINA, str.
Budajskaja 13-35, RU-129128
Moskvo, svsmetanina@yandex.ru

Slovakio: Magdaléna FEIFIČOVÁ,
Bernolákova 25/5, SK-010 01
Žilina, ilei.officejo@gmail.com

Tajvano: Reza KHEIRKHAH,
Chung Ching Road, No. 105, TW-
Pingtung city, 900-73,
rezamenhof@yahoo.com

Urugvajo: Sonia RISSO, Pascual
Costa 3253 Apto 1215, UY-11700
Montevideo, sonry@adinet.com.uy

KONTAKTPERSONOJ

Argentino: Gabriel Enrique
WAGNER, Misiones 1421,
AR-3116 Crespo-Entre Rios,
gwagner@digitaloffice.com.ar
Aŭstrio: Uwe STECHER,
Zaunscherbgasse 3/3/6, AT-1210
Wien, punktor@live.at

Bolivio: Leandra DIA RIOS, Calle
Maria Estívariz No 290, Avenida
Coronel Valdez Pasaje Zaratustra,
Villa Pabón, Zona Central, La Paz,
mileis_7@hotmail.com

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta
KULENOVIĆ, Branica Sarajevo
15/V, BA-71000 Sarajevo

Estonio: Helgi HROMOVA,
Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Haitio: Christine THEANO,
Christ-Roi, Imp. Romane # 41,
HT-6110 Port-au-Prince,
christinetheano@hotmail.com

Indonezio: Ilia Sumilfia DEWI,
Perumahan, Pejuang, Pratama,
Blok L, no. 11, RT/RW 003/006,
ID-Bekasi, Jawa Barat,
ilia.dewi@gmail.com

Kenjo: Gilbert S. SIKALA,
Chemomi Estate, P.O. Box 22,
KE-30301 Nandi Hills,
simiyugilbert@yahoo.com

Kostariko: Hugo MORA
Poltronieri, Apartado 4981, CR-
1000 San José, tikoguau@gmail.com

Litovio: Grazina OPULSKIENE,
Tylioji32-22 Mazeikiai, LT-
893307, grazopul@yahoo.com

Luksemburgo: Claude
NOURMONT, 2 om Klappchen, LU-
5682 Dalheim, moonmont@pt.lu

Niĝerlandio: Illiassou BOUKARI,
BP 5002, Niamey, Niger.
elliassdj@gmail.com

Nikaragvo: Uriel GURDIAN,
Rpto. Shick 2da etapa, Iglesia
adventista 1c O, 1c N. Casa G-32,
Managua, Nicaragua,
esperantonica@gmail.com

Portugalio: Luís LADEIRA,
Rua Manuel Valadares, 10, 2E
PT-2650-192 Amadora
luisladeira@portugalmail.pt

Tagikio: Firdaus SHUKUROV,
Glavpochtamt, a.k.135 TJ-734000
Dushanbe, komintel@yandex.ru;
aet2005@yandex.ru

Senegalo: Assane FAYE,
BP:1186, Rufisque, Senegal.
damanemanu2000@yahoo.fr

Slovenio: Peter GRBEC
Sv. Peter 142,
SL- 6333 Sečovlje
peter.grbec@gmail.com

Srilanko: Zeiter PERERA,
U.L.F.G.Zeiter Perera,197,
Indivitiya Road, Hettigama, Jaela,
Srilanka, zeiter.espero@gmail.com

Venezuelo: Asociación
Venezolana de E-o, Ricardo
COUTINHO, Apartado postal 47675,
Caracas 1041-A, VE
venesperanto@cantv.net

